



HUNGARA VIVO

1

1975

8,-Ft



LEHEL 210/60

**KOMPRESORA
DOMMASTRUMA
FRIDUJO**

HAVEBLA:
en Modelvendejo de Fridujfabriko
Budapest, V., Sütő u. 2.

PRODUKTAS:
Fridujfabriko (Hűtőgépgyár,
Jászberény)



Ni estis multope

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
1368 Budapest, Hungario,
Kenyérmező u. 6.
Aperas dumonate
XV. jaro 1975. 1-a numero

ENHAVO

<i>Ferenc Sánta</i> : Ni estis multope — Trad. Lenke Kun	1
<i>D-ro Jozefo Mátéffy</i> : Pri la Prezidia Konsilio de la Hungara Popolrespubliko	5
<i>E. P.</i> : Feriado de esperantistoj en Hungarlando	6
<i>Mihály Gergely</i> : Granda humanista pentristo	7
<i>Raymond Schwartz</i> : Laŭ mia... ridpunkto	8
<i>Leonid Martinov</i> : Marto — El la rusa: I. Hoves	9
<i>D-ro István Szerdahelyi</i> : Esperanto en la spegulo de la moderna lingvoscienco	10
<i>Frigyes Karinthy</i> : Prelego — Trad. M. Fejes:	11
Panoramo — (Szilárd Bálint)	14
Sudhungarlanda Stelo	16
1945—1975 Nia historio laŭ konfeso de malnovaj fotoj — Balado de la milito. Komp.: M. G.	17
<i>K. Kalocsay</i> : En ĉi murdepoko	17
<i>K. Kalocsay</i> : Lingvo kaj logiko	18
<i>Paŭlo Balkányi</i> : La malnovaj foiroj en la hungara ĉefurbo	23
<i>Lajos Tárkony</i> : Revuo de Revuoj	24
<i>Paŭlo Balkányi</i> : Hungara aventurulo — Madagaskara reĝo	25
<i>Tamás Bárány</i> : Vetero senkompata — Trad. Tibor Újlaky—Nagy	26
<i>Ada Csiszár</i> : Multe da mono — ne ĉiam bono	29
Banko	29
<i>Edwin de Kock</i> : Kadukiĝo	29
Leterkesto. Komp.: L. Rieth	30
Korespondi deziras	30
Humuro	30
<i>E. I. Senregula</i> recenzo pri la dramo „Doktoro Rosales”	30
Krucvortenigmo — FERI	31
Karikaturoj de Antal Csermák	11

Sur la titolpaĝo: Desegno de
Károly Reich

Jam la trian monaton ni malsatadis, kaj de du semajnoj ni manĝis nur unu fojon tage. Mia patrino jam per polmo dismezuris la maizkaĉon. Unu polmo da polento, por du manĝoj, plu nenio ĝis la sekva tago. Ni, infanoj, kuŝis kvarope sub la granda kovrilo. Tie ni povis varmiĝadi, kaj tie ni estis obstaklo al neniu. Mia patro jam ne iradis akiri laboron kiel tagsalajrulo. Tre longe li provadis tion. Multaj estis la malriĉuloj, malmultaj la mastroj, li ne ricevis laboron. Dum la tuta tago li sidis apud la forno sur eta buŝelo. Tre malofte li venis inter nin kaj komencis fabeli. Sed kiel subite li venis, tiel same neatendite li ĉesis rakonti. Tiam li diris: „Morgaŭ mi rakontos la ceteron”. Ni tion ne tre bedaŭris. Tiel longajn paŭzojn li faris dum fabelado, ke estis pli bone, se li sidis en sia loko.

Granda afero estas la malsato. Kiu ĝin ne trasuferis, ne povas tion eĉ imagi. Kiam ni ricevis poe la polmon da polento, kaj ĝin voris, kia ĝi estis, varmege, poste tuj ni desaltis de la lito, prenis sur la genuojn la grandan knedotabulon, sur kiu mia patrino distrancis la porciojn, kaj, unu per fingro, alia per poŝtrancilo, ni deskrapis de ĝi, kion ni trovis, kaj ĝin manĝis. Kvankam en ĝi estis pli da splitoj ol da manĝaĵo. En tia malsatmizero ĉiuj buŝoj devas esti kalkulataj. Ju pli multe estas da ili, des pli granda estas la zorgo. Kaj ni ne estis malmultope.

Iun vesperon okazis, ke mia avo, kiu estas jam trans sia sepdeka, eble eĉ sepdek-kvina jaro, ne manĝis sian propran porcion, sed portis ĝin al nia lito. Per siaj grandaj faltaj manoj li disŝutis ĝin inter ni, kaj ni ĝin kaptadis kiel kokidoj. Ni ne povis trapensi, kaj tial ankaŭ ne demandis lin per vortoj, kio lin trafis, ke li fordonas la sian. Ni rigardis kun grandaj miraj okuloj kaj manĝis. Nur mia patro ekparolis. Per siaj enkaviĝintaj grizaj okuloj li suprenrigardis al mia avo. Poste li deturnis sin direkte al la bakforno kaj diris: — Ja bone vi faras tion. — Kaj mi ankaŭ pensis, ke jes ja, ĉar eĉ se malmulta estis la neatendita manĝo, ĝi gustis bone, sed mi ne pensis ion pluan. Mia avo plu skrapadis de sia polmo la aretojn de la maizkaĉo, kaj, kvazaŭ li parolus al si mem, li rediris mallaŭte:

— Ĉu tion vi pensas, Francjo?

— Jes! — respondis mia patro.

Mia patrino faligis la grandan vazlavujon kaj tion ni ekatentis. Si rigardis kun timiĝa mieno la parolantojn, jen mian patron, jen mian avon, kvazaŭ ŝi mem eĉ ne ekzistus. Poste ŝi renkontis la okulojn de mia patro kaj malrapide sin deturnis, kvazaŭ miksinte sin en aferon ne-virinan. Mia avo viŝis sian manon laŭlonge de sia pantalono. Poste li komencis ordigi la kusenon sub nia kapo, sed kun tia zorgemo kaj malrapideco, kvazaŭ li estus vartistino aŭ almenaŭ virino. Lia mano ankoraŭ estis sub nia kapo, sed li jam turnis sin kaj ekiris al mia patro. Kiam li atingis la fornon, li kliniĝis kaj komencis rompadu branĉojn. Li metadis ilin bele, po unu, en vicon, kaj kiam li tion finis, li diris al mia patro:

— Venontjare provu la agron de András Kácsa por kvaronprodukto. Alie li ĝin ja ne donos. Bona tero estas la Blankaj Bordo. Kaj tiam vi povos jam utiligi ankaŭ la etan Francjon.

Mia patro lin ne alrigardis, ion li prenis inter la dentojn kaj maldadis.

— Kaj kion diras Jani Tótos, pripensu ankaŭ tion. Portu kune mi-

neralakvon en la urbon. En tri jaroj vi povos akiri ĉevalon.

Mia patro nur silentis. Malnova ideo de mia avo estis tiuj: la minerala akvo kaj la Blankaj Bordoĵoj. Alifoje mia patro eĉ ne lasis, ke li rakontu tion ĝisfine, sed nun li aŭskultadis, kaj ni ne sciis kion pensi pro nia miro. Ankaŭ mia avo certe pensis, ke vane li parolas, ĉar li stariĝis kaj metis la manon sur la ŝultron de mia patro.

— Nu do, ni ne prokrastadu, Franĉjo; ĉu vi min aŭdas, filo?

Mia patro stariĝis, iom sin skuis, kaj, kvazaŭ li parolus al mia patrino, alrigardis ŝin:

— Do prepariĝu. La ceteron mi aranĝos.

Tiam mi vidis, ke mia patrino jam staras en la pordo, kaj ploras, kvazaŭ ŝi ĉeestus enterigon, kaj, kiam mia patro stariĝis, ŝi etendis la manon al la vesto-kroĉilo kaj donis al li lian jakon kaj la peltoĉapon. Sed kvazaŭ ŝi kaj donus ilin kaj ne. Kiel se iu scias, ke oni lin batos, se li ion ne faros. Mia patro nur ĵetis la jakon sur la ŝultrojn, kvankam tio ne estis lia kutimo, kaj eĉ ne rerigardis, tiel li eliris tra la pordo.

Mi jam estis grandeta, kaj mi gapis, kio estas tiu granda senvorteco. Mi gapis tiel longe, ĝis mi eksentis la avon apud mi.

— Poste . . . aŭdu! Tiun neston, kiun mi al vi montris flanke de la Bálványos-monto, ĉu vi ĝin prenos?

Li rigardis min kaj estis tia, kvazaŭ li plorus.

— Kaj tiun belan sambuk-branĉon, taŭgan por ŝtonĵetilo, ĉu vi ĝin detranĉos?

Mi gapis, ne sciante kion pensi.

— Poste printempe tiun belan fortan vulpon, kiun mi montris, ĉu vi ĝin elfumos? Vi, Franĉjeto, vi.

Mi lin rigardis kaj ne sciis, ĉu li larmas. Al mia patrino mi rigardis, sed ne trovis ŝiajn okulojn. Mi turnis min al mia avo:

— Kio do al vi okazis, avoĉjo?

Sed li jam ne rigardis min. Li tenis la ŝalmon, kiun li eltiris el sub mia kusenon; ties truetojn li palpadas, karesadis, kvazaŭ ne li mem estus ĝin farinta. Li ĝin levis ankaŭ al sia buŝo, sed apenaŭ li enblovis, li jam demetis ĝin. Li aliris mian patrino.

— Donu tiun puran subveston, Anna.

Ankaŭ ĝis nun stranga estis ĉio, sed nun jam nek mian patron, nek mian patrino, nek mian avon mi sciis kiel kompreni. Ĉar mia patrino malfermis la grandan keston kaj donis laŭvice la puraĵojn: kalsonon, ĉemizon, ŝtrumpojn. Kaj ŝi donis ilin tiel bele, ne kvazaŭ ordonate, sed kiel al ni, infanoj, kiam ŝi vestadis nin por kirko. Kaj mia avo surmetis ĉiujn. Ankaŭ sian vizaĝon ŝi ŝmiris per iomete da akvo kaj sidiĝis ĉe la tablo. Estis tiel, kvazaŭ li estus gastigata. Nek supren, nek infren li rigardis, nur sidis tie por si mem, la du manojn li lasis fali en la sinon, snufis unu- aŭ dufoje, kaj moviĝis nur por viŝi kelkfoje sian nazon per la mansupro. Nek mian patrino li alrigardis, nek min.

Mia patrino metis sur la fajrujon akvon en la granda poto, kvankam la maizkaĉo jam esti preta, ni ĝin eĉ manĝis. Por kio, mi ne sciis. Mia patro ja elbatus al ŝi la okulojn, se ŝi kuirus ankoraŭ polen-

ton. Almenaŭ li kutimis diri tion, kiam nia patrino nin ekkompatis kaj volis sekrete al ni doni ankoraŭ iom.

Kiam mia patro revenis, ili ambaŭ faris ankoraŭ tion saman: unu kondukis kiel gasto, la alia boligis por li la akvon. Mi tuj rimarkis, ke mia patro ne iras rektavoje. Li tenis kokinon sub la akselo, belan, grandan, punktomakulitan, kaj en lia mano estis brando. Ĉion ĉi li povis peti nur je kredito, kaj mi ne sciis, kiu povis esti tiu frenezulo, kiu al li donis. Li transdonis la kokinon al mia patrino, la brandon metis antaŭ mian avon. Poste la jakon li demetis kaj sidiĝis al la tablo tiel, kvazaŭ ekde nokto li estus peze laborinta. Tamen, la tutan tagon li nur sin varmigadis.

Ĝis la kokino estis kuirita, ili silentis. Mia patro tranĉetis per poŝtranĉilo siajn ungojn, mia avo trinkis.

Tiaodoro inundis el la poto, ke salivo kolektiĝis en mia buŝangulo, ni puŝetis unu la alian sub la kovrilo, ni ordigadis niajn gambojn, por ke la manĝopoto havu por si lokon. Poste ni ne ricevis eĉ unu gluton. Mia avo ĝin manĝis sola, ĉiom, ĝis la lasta peco. Li alrigardadis nin, kaj unufoje volis doni. Sed mia patro kaptis lian manon tiel, kvazaŭ li estus lia kolerulo:

— Ilin nur lasu! Manĝu mem ĝin, ĉar la tuto estas via.

Se ĉio, kion ili faris, ne estus tiel freneza kaj sen-senca, kiel neniam io ajn, mi certe estus esplorinta. Sed pro la granda surprizo eĉ tion mi nun ne povis fari. Mi gapis, kiel mia avo manĝas, kiel li ŝiradas per siaj fingroj la viandon, kaj nur tiam mi deprenis de li la rigardon, kiam mi vidis, ke mia patro min alrigardas. Bato estis en liaj okuloj, granda bato. En la silento, kiu sursidis la domon, aŭdiĝis nur la snufado kaj ŝmacado de mia avo.

Mia patrino komencis repurigi la tablon kaj mia avo eĉ ne atendis ties finon, sed stariĝis, prenis sian veŝton, jakon, hakilon. Mia patro staris post li kun tia longiĝinta vizaĝo, kiel oni staras antaŭ pastro. Subite, kvazaŭ timante, ke la pordon oni ŝlosos antaŭ li, mia avo ĝin aliris. Li malfermis la pordon, jam duone li estis ekstere, kiam li retranskiviliĝis kaj sin returnis. Iel honteme, aŭ kiel oni kutimas fari ĉe priploro de mortinto, li komencis ordigi la lipharojn. Nun jam tamen ŝajnis al mi, ke li ploras iomete. Li alrigardis mian patrino, poste min. Mia patrino venis al mi. Si vestis min, mia patro tion lasis, neniam ankoraŭ okazis tio.

Ni eliris en la mallumon. Estis stelbrila, granda nokto. Krude frida vetero, kvazaŭ eĉ la aero estus frostiĝinta. Mia patro staris sen ĉapo, mi en la pantoflo de mia frato, kaj mi forgesis eĉ pri tio, ke al mi estas fride. Mi rigardis ĉi tiun grandan mir-aferon kaj ia ploro streĉis sin en mia gorĝo, kiel se okazas io tre malbona: la domo brulas aŭ mi estas batata. Mi deprenis la rigardon de sur la figuro de mia avo. Li staris sur ŝtupo de la verando. Unu manon li lasis en la poŝo, per la alia li tenis forte sian hakilon, tiel, kiel se iu sin gardas kontraŭ urso. Guste tiel. Kaj ĝuste tia li estis. Ankau mia patrino ne moviĝis. Li forrigardis ien, kvankam nemulte li

VIRAĜ VIRAĜA, VILAĜNAK VILAĜA. KESERŬEN KINZATOL
VOS SZEGEKKE VERETŬL. (OMAGN MŬINIA SINALOM)



Desegno de Adám Wŭrtz

povis vidi. Postlonge mia avo ekparolis en la silento:

— Morgaŭ matene elvenu, ĉar mi lasos ĉion tie.

Mia patro nur movis la kapon al la ĉielo, kvazaŭ la stelojn li kalkulus. Mia avo kroĉis sian hakiĵon sur sian brakon kaj forsaltis:

— Dio vin benu, filo.

Mia patro moviĝis, rigardis la teron kaj diris, kvazaŭ al ĉi tiu li parolus:

— Dio vin benu.

Kaj post kiam mia avo ekiris, tre mallaŭte parolis post lin:

— Poste, estu singarda.

Mi nur postrigardis mian avon, kiel li transiras la vojon ale al la streta strato, kaj mi volis alkrii, ke li min ne adiaŭis, kaj Dio lin benu. Mi volis jam lin postkuri, kiam li haltis. Iom li tretetadis samloke, sed tamen li sin turnis. Apenaŭ aŭdeblis lia voĉo:

— Francĵeton... Lasu do lin... kun mi iomete!

Kvazaŭ nur tiam mia patro min rimarkus, tiel li min rigardis nun de ĉapo ĝis ŝuoj.

— Iru al via avo.

Li staris tie senmove, kaj kiam mi lin atingis, li prenis mian manon. Tiel li kondukis min, kiel tiam, kiam ni iris kolekti frambon kaj dumvoje li diris la belajn fabelojn, instruis min pri ĉi kaj tio: elpreni ovojn, trovi mielon, serĉi bokbarbon kaj aliajn herbojn. Sed nun li ne parolis. Tre malrapide li

paŝadis, ek- kaj ekpemis mian manon, kiel li kutimis fari kiam li diris ion tro grandan en fabelo. Mi stumpletadis apud li, ĉar lin mi rigardis, kaj mi ne sciis, ĉu li estas freneza, aŭ kiu lin ofendis, kaj mi volis diri, ke li tion ne faru, ĉar mi tuj devos plori. Ĉe la barilo li haltis. Li kaŭriĝis al mi, rigardadis min kelkan tempon, poste surkraĉetis min trifoje en formo de kruco, kiel oni kutimis fari al novnaskito aŭ malsana infaneto, por ke nenio malbona sur lin efiku. Li eĉ kisigis min, kion neniam antaŭe li faris, kaj diris per malbela raŭka voĉo:

— Reiru, kaj diru al via patrino, ke ŝi vin gardu, ĉar vi plu ne vidos min.

Li stariĝis tiel rapide, kvazaŭ oni lin vokus. Li plu ne alrigardis min, kaj kiam mi ekkonsciis, jam apenaŭ mi vidis en la granda neĝado, kiu dume komenciĝis, ke li iras kaj perdiĝas inter la arboj, ĉar tuj proksime troviĝis la arbaro.

Mia patro ankoraŭ staris, kie mi lin lasis. Tiel same li rigardis la ĉielon kaj sendis min eniri sola.

La malpli grandaj dormis, mia patrino ne estis en la ĉambro. Mi sidiĝis sur la loko de mia avo, kaj kiam mia patro envenis, mi demandis, ĉar plu mi ne povis min deteni — kiam mia avo revenos?

— Tiam, kiam vi tion ne demandos! — li respondis kaj estis tre kolera. Li tiradis la okulojn, iradis tien-reen, kiel katenita urso ĉe la mano de bastonhava homo. Li prenis jen tion jen ĉi tion, sed tuj li ĝin demetis, fine li sidiĝis sur la buŝelo. Li komencis rigardi la fajron. Kiam mia patrino enpor-

tis la branĉojn, li komencis meti ilin sur la fajron. Li nur metis, metadis ilin. Por tiel granda fajro, ke tian mi ankoraŭ ne vidis en la bakforno. Ĝiaj flamoj elĵetiĝis supre kaj ankaŭ tra la fornopordo ili elbloviĝis kiel fulmotondro, ĝiaj fajreroj turniĝadis, kraketadis kiel inferfajro. Kaj la tuta faritaĵo krakis kaj ĝemis. Kaj li sidis tie kaj metadis la branĉojn kun tiel timiga vizaĝo, ke, mi pensis, ne estus bone eĉ ekpepi, ĉar li min tuj mortbatus.

Iu tretadis antaŭ la pordo, mia patrino iris lin akcepti kaj revenis kun Ignác Csűrös, avo de Kelemen, baptano de mia avo.

— Bonan vesperon.

— Bonvenon — resalutis mia patro, sed ne moviĝis, nur fermis la pordon de la bakforno. Mia patrino viŝis pura seĝon, kaj oĉjo Ignác, apogiĝante sur sian bastonon, sidiĝis. Neniu lin alparolis, sed mi vidis, ke li forte volas paroli. Li moviĝadis, senraspigis la gorgon, palpebrumis per la etaj maljunaj okuloj, kaj, ĉar longe neniu demandis lin, ekparolis:

— Do, kie via patro estas?

Mia patro ankaŭ nun ne alrigardis lin.

— Vi povas vidi, ke li ne estas ĉi-interne.

Oĉjo Ignác prenis sian tabakon, sed, kvazaŭ forgesinte, kion li volas, li ne ekfumis. Ĉirkaŭrigardis. Ankaŭ al ni, ankaŭ al la vizaĝo de mia patrino, fine al la seĝeto, kie li ekvidis la demetitajn vestojn de mia avo. Li riporozigis sur ĝi la okulojn dum kelka tempo, komencis puŝeti sian kampulsandalon per sia granda kokopa bastono, kaj ne suprenrigardante li demandis:

— Poste, ĉu estas vere, ke li foriris?

— Kien? — demandis mia patro kaj rigardis oĉjon Ignác alokule.

— Supren al la monto Stinka* — li respondis.

Tiel min ekpuŝis mia koro, kvazaŭ ĝi estus ekbatita. Tiel seka fariĝis mia gorgo, kvazaŭ nun subite oni estus enblovinta. Tiel varmega fariĝis la kovrilo, kvazaŭ ĝi estus arda fero.

Ve, la Stinka. Kiu nur ensnufas en ĝi, ĉiu ajn mortas. De tie vivanta homido ne elvenas plu. Se birdo enflugas, ĝi ne elflugos, ĉar ĝi mortas. Ankaŭ mia avo mortas. Li estu ja singarda, io malbona lin ne trafu, ankaŭ mia patro diris, kiam li lin postkriis. Sed li ne revenos. Do ĝuste tien li iris, kaj mia patro tion volis, ankaŭ mia patrino tion lasis, se ili lin ne rekte sendis. Ve, mia Dio! Li, mia avo! Kaj ili ne iras post lin, nek volas iri, nek mi mem povas. Antaŭ monato, proksimume, iu rakontis al mi tion, kaj diris, ke tia estas ties ordo. Nur tion mi ne sciis, ke tiel oni tion faras, tiel preparas. Kaj ĝuste al mia avo. Ve, mia bona Dio, kie li nun iras? Certe jam trans Uzonka li estas. Certe ankaŭ trans la pinara deklivo. Ĝi estas lup-irata regiono, nur ne okazu malbono, lupo lin ne batu teren. Ploro el mi ekverŝiĝis, ege poltrone, sed ke mia patro tion ne vidu, tiel singarde.

Mia patro alrigardis oĉjon Ignác: — De kie vi scias tion?

* Monto Stinka (Büdös) troviĝas en la Orientaj Karpatoj en Transilvanio. Sur ĝia flanko estas la Stinka Groto, tra kiu eliĝas sulfurioksidaj kaj karbodioksidoj, gasoj mortigaj. Stinka = malbonodora.

— Mia filo diris. Paroliĝas, ke vi estis en drinkejo preni brandon. Ankaŭ kokinojn oni vidis kun vi.

— Tio estas vera — diris mia patro, kaj jam ree li estis tia kiel antaŭe. Eĉ la fornopordon li malfermis por vidi la fajron.

— Ĉu li foriris antaŭlonge?

Mia patro ne parolis plu. Li eĉ ne rimarkis oĉjon Ignác. Mia patrino ekparolis, sed apenaŭ venis voĉo el ŝia gorgo:

— Eble kvaronhoro pasis de tiam.

Oĉjo Ignác ekbalancis la kapon, stariĝis kaj ekiris. Ĉe la malfermita pordo li returniĝis kaj alrigardante nin, demandis mian patrino:

— Ĉu ilin li kisis?

— Neniu — respondis mia patrino kaj komencis viŝi la okulojn per sia antaŭtuko.

Mia patrino, reveninte, sidiĝis kaj komencis kudri. Mia patro ree forte amariĝis, ĉar li flamigis la fajron eĉ pli ol antaŭe. Mi ne povis paroli, ankaŭ ne parolis. Tiel mi endormiĝis en la granda plorado.

Matene min vekis mia patro. Li estis tia, kvazaŭ li tute ne estus kuŝiĝinta.

— Preparu vin, ĉar ni iros en la arbaron por haki arbon.

Li estis prava, ĉar eĉ iomete da ligno ne troviĝis en la domo, ĉiom li forbruligis nokte. Ĝis tagmezo ni hakadis, kaj en mian kapon venadis mia avo, en tiun de mia patro mi ne scias kio, sed li nulfoje min batis, kvankam mi tranĉvundis mian fingron.

Kiam li diris, ke ni povas iri, mi turnis min al la pado alhejma. Sed li ordonis min retro: „Ne tien, he!” Kaj ni ekpasis tra la ŝtonoza deklivo supren al la Stinka Monto. Mia koro bruadis kiel alarme svingata sonorilo. Mi paŝadis sur la spuroj de mia patro. Li ne tenis mian manon, kiel mia avo kutimis fari.

Antaŭ la faŭko de la groto ni retrovis ĉion. Bele, laŭvice estis tien metitaj ĉemizoj, kalsono, jako, la aĵoj de mia avo. Supre lia peltoĉapo, surpremata de granda ŝtono. La hakilon li portis kun si. Tiel malgranda, tia neniomo estis tiu amaseto, kvazaŭ ili ne apartenus al mia avo. Kvazaŭ por homo ne sufiĉus en ili la spaco.

Mia patro kliniĝis kaj komencis metadi ĉion laŭvice sur mian brakon, Kiam li volis meti la peltoĉapon, io el ĝi elfalis, ruliĝis for sur la neĝo, kaj ni ĝin pririgardis: ĝi estis unu femuro de la kokino. Mi ne kapablis moviĝi por ĝin levi. Mia patro ĝin allevis. Li pesadis ĝin en sia mano, kaj poste tiel milde, tenere, kiel ian birdideton, li glitigis ĝin en mian tornistron. Li paŝis al mi proksimen. Kion ankoraŭ neniam li faris, nun iele per sia mansupro li trakaresis mian vizaĝon.

— Hejme ĝin vi manĝos — li diris —, ĉar nun ĝi estas frosta.

Li ne pensis, ankaŭ ne parolis pri tio, ke plurope ni estas hejme, ĉar li sciis, ke mi estis la amato de la koro de mia avo.

Pli interne, en la faŭko de la groto ankoraŭ nigris ia aĵo. Ĝi apartenis al Ignác Csűrös. Neniu por ĝi ankoraŭ venis, kaj eble ankaŭ ne venos, ĉar eĉ tiel estis videble, ke ĝi estas nur truo apud truo, eĉ groŝon neniu por ĝi donus.

Tr.: Lenke KUN

Pri la Prezidia Konsilio de la Hungara Popolrespubliko

Sub la nocio „ŝtatestro” oni ordinare pensas pri homoj, kiuj havante diversajn titolojn (ekzemple reĝo, imperiestro, respublika prezidento), kaj disponante praktike pli-malpli limigitan efektivan potencon, tamen ne diferencas en unu rilato, nome, ke ili ĉiuj *unupersono* reprezentas sian landon, do, el tiu aspekto la ŝtatpotenco manifestiĝas *en unu persono*. Indiferentas, ĉu la rajto esti la plej ĉefa reprezentanto de la ŝtato, baziĝas sur dinastia heredrajto, aŭ ĝi estis akirita rezulte de elekto.

Historia pasejo

Post la unua mondmilito *fakte*, kaj post la dua ankaŭ *laŭjure* Hungarujo ĉesis resti reĝlando. Nome, inter la du militoj, ĝis la planita sed neniam realiĝinta elekto de nacia reĝo, provizore ŝtatestris gubernatoro, aliparte post la dua mondmilito la hungara nacio elektis novan ŝtatformon, nome tiun de respubliko. Dum kelkaj jaroj la ŝtatestran funkcion plenumis respublika prezidento, elektita de la parlamento. Tiu situacio daŭris ĝis la naskiĝo de la Konstitucio.

Statestro kolektiva

La jaro 1949 havas grandan signifon en la historio de la hungara popolo. En tiu jaro, la 20-an de Aŭgusto validiĝis la Konstitucio de la Hungara Popolrespubliko.

Konforme al la realo nia Konstitucio fiksas, ke la plej supera ŝtatpotenca organo de la Hungara Popolrespubliko estas la parlamento, kiu praktikas ĉiujn rajtojn devenantajn el la popolsuvereneco. La parlamento esprimas kaj realigas la plenpotencon de la hungara popolo. En nia respubliko ne ekzistas alia potenco, kiu regas super la parlamento, aŭ kiu povus validiĝi kontraŭ ĝi. La parlamento realigas

tiel la senlimitecon de la ŝtatpotenco.

La malnova principo pri la divido de la ŝtatpotenco estas forĵetita kaj ĝin anstataŭas la scienca, socialisma ŝtateorio, laŭ kies senco la plena potenco apartenas nedivide al la parlamento. Ne tiel estis pli frue, ĉar la respublika prezidento ne estis membro de la parlamento, krome, kelkaj partoj de la ŝtatpotenco, kiel nomumo de la registaro kaj la disigo de la parlamento apartenis ekskluzive al la agosfero de la prezidento.

Baze de la supraj principoj la konstitucio ĉesigis la unupersonan reprezentadon de la ŝtato kaj ordonis krei novan ŝtatorganon. Tiu organo estas la Prezidia Konsilio.

Konsisto kaj rolo de la Prezidia Konsilio

La Prezidia Konsilio konsistas el 21 egalrajtaj membroj (prezidanto, du vicprezidantoj, sekretario kaj 17 membroj). La membrojn de tiu korporacio elektas la parlamento el siaj propraj membroj. La elektitoj, eĉ post sia elekto, restas plu parlamentanoj, ilia kolektivo estas do parto de parlamento, kun speciala komisiio. Kiam la parlamento ne kunsidas (ĝi havas po du sesioj jare), inter la sesioj la Prezidia Konsilio anstataŭas ĝin. Tamen ĝi ne rajtas modifi la konstitucion kaj estas responda al la parlamento. La mandato de la Prezidia Konsilio ĉesas nur post la elekto de la novaj membroj en la konsilion. Tiel la konstanteco de la popolpotenco estas certigata.

Krom anstataŭi la parlamenton, la Prezidia Konsilio havas ankaŭ specialajn taskojn. Inter ili estas: ligi internaciajn kontraktojn, komisiĝi kaj akcepti ambasadorojn kaj diplomaciajn senditojn, kunvoki la parlamenton, fondi kaj donaci ŝtatajn ordenojn, permesi porti fremdajn ŝtatdekoraciojn, praktiki

amnestian rajton. Sekve de siaj karakteroj, tiuj rajtoj kaj devoj apartenas kutime al agosfero de ŝtatestro. Tiel estas ankaŭ ĉe ni, tamen kun la diferenco, ke ili korpориĝas ne en unu persono, sed en kolektivo. La Prezidia Konsilio estas en tia senco vere „kolektiva prezidento” de la Hungara Popolrespubliko.

Kiel dirite, la membroj de la ŝtatestra korporacio estas egalrajtaj, do ne nur la prezidanto, sed iu ajn membro povas reprezenti nian ŝtaton. Ekzemple post morto de la franca ŝtatĉefo Pompidou, kaj de la aŭstra ŝtatestro Franz Jonas ĉe la oficiala funebra solenaĵo, la prezidanto de la Prezidia Konsilio, Pál Losonczi reprezentis la hungaran ŝtaton. Alifoje ĝia membro, la kalvinana episkopo d-ro Tibor Bartha florkronadis je la nomo de la hungara ŝtato en tombejo de la heroaj mortintoj de Unuiĝantaj Ŝtatoj de Ameriko.

Grava tasko de la Prezidia Konsilio estas gardi la plenumon de la konstitucio. En ties agosfero ĝi rajtas nuligi respektive modifi ĉiujn jurnormojn, ŝtadadministran decidon, disponon, kontraŭajn al la konstitucio. Tion ebligas, ke la „kolektiva ŝtatestro” kaj la plej supera ŝtata plenumorgano (la registaro) estas disigitaj unu de la alia. Ekz-e la ĉefministro, ministroj, ŝtatssekretarioj ne povas esti membroj de la Prezidia Konsilio. Tiel la ŝtatestra korporacio povas konstitucie kontroli ankaŭ la registaran laboron.

Fine, sed certe ne malplej grave, la Prezidia Konsilio havas rajton fari leĝvalidajn dekretojn. Tio plifirmigas la civitanajn kaj sociajn rilatojn.

La pasinta kvaronjarcento jam pruvis, ke tiu novtipa institucio de nia konstitucio montrigis taŭga en la praktiko. Ĝi altgrade kontribuis al tio, ke la popolpotenco ĉe ni estas stabila kaj en Hungarlando regas laŭleĝa ordo.

FERIADO DE ESPERANTISTOJ EN HUNGARLANDO

Inter la esperantistaro ekde la komencaj jaroj de la movado vivas la deziro renkontiĝi kun amikoj konataj kaj persone interkonatiĝi kun nekonataj korespond-amikoj. En la unuaj jardekoj la universalaj kaj landaj Esperantokongresoj kontentigis ĉi tiun deziron. Iom post iom evidentiĝis, ke tiaj manifestacioj ne sufiĉas: Bezonataj estas diverskarakteraj malpli grandnombraj renkontoj, kies lingvo estas Esperanto. Tiu ĉi konkludo renkontinte la modernan mondfenomenon pri turismo kreadis la elformiĝon de feriadoj poresperantistaj en diversaj regionoj de la tuta mondo.

Ankaŭ en Hungarlando la esperantistaj feriadoj, renkontoj havas jam plurjaran tradicion kaj rekonon fare de la partoprenintoj.

Jen ili prepariĝas akcepti gastojn ankaŭ en la jaro 1975.

13a SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO (Gyula — 1975—07—06/12)

Antaŭ 13 jaroj SEU invitis la unuan fojon volontulojn partopreni sciencpopularigajn prelegojn en Esperanto, pasigante sep tagojn en la ĉarma ebenaja urbo Gyula. Pri la altnivelaj prelegoj la Sciencpopulariga Instituto prizorgas kiel kunaranganto. Post la prelegoj la partoprenantoj vizitas la termobanejon de Gyula en la 15-hektara praarbaro kun freŝa herbaro, bele flegataj florbedoj, kie ombraj arboj ofertas ripozon kaj trankvilon.

De jaro al jaro plivastiĝas la populareco de tiu ĉi aranĝo kaj centoj da vizitantoj alvenas el ĉiu parto de la mondo.

8a PIONIRA INTERNACIA TENDUMADO (Zánka — 1975—08—15—27)

En la plano de la internaciaj aranĝoj rolas ankaŭ la 8-a PIT por 10—15 jaraj esperantistaj lernantoj. La Asocio de Hungaraj Pioniroj malfermis la pordon de la granda „pionira urbo” Zánka por la Esperanto-Faktendaro. 200 pioniroj, gelnantoj diversnaciaj, pasigos ĉi tie apud la lago Balaton du semajnojn sub gvido kaj protektado de esperantistaj instruistoj. Lingvoperfektigaj kursoj per gaja luda metodo servas evoluigi la konojn en la internacia lingvo, kiun la infanoj praktikas intensive dum la feriado. El la programo ne mankas sportaj ludoj, naĝado en Balaton, diversaj konkursoj, naciaj kaj internaciaj prezentoj ĉe tendarfajro, eĉ tuttaga ekskurso al interesaj vidindaĵoj en la regiono de Balaton.

VIRINA INTERNACIA RENKONTO (Budapest — 1975—07—13)

Estas ŝatata aranĝo de la Virina Komisiono de HEA. Estas invitataj esperantistinoj diversnaciaj troviĝantaj en Hungarlando.

8a INTERNACIA RENKONTIĜO NATURAMIKA (Abaliget-Pécs 1975—07—12/21)

La Teritoria Komitato de HEA en Pécs la okan fojon dissendas invitilojn al IREN okazonta en ripozloko Abaliget kaj en urbo Pécs. Kiu ŝatas la naturon, mon-

tojn, arbaron kaj akvon kaj volas ĝui amikan esperantistan etoson, havos bonajn impresojn, belajn rememorojn pri tiu ĉi renkontiĝo. Sen konferencoj sed kun multaj ekskursoj perpiede kaj aŭtobuse efektiviĝas turismo en praktiko. En agrabla kampadeja feriado oni povas forgesi la zorgojn de la ĉiutago, havigi novajn amikojn, refreŝigi korpe kaj anime. Gajaj vesperoj kun tendarfajro, lampiona boatado, hungara vespero kun prezentado, vingustumado atendas la partoprenantojn. Sen vizito en la urbo dumiljara Pécs neniu povas forlasi la regionon de la montaro Mecsek.

La partoprenintoj poste povos atingi la Universalan Kongreson en Kopenhago.

4a VARIA INTERNACIA SEMAJNO

(Budapest, 1975—08—18/23)

La vizitantojn de VIS akceptas riĉa programo kun diversaj surprizoj. Ili rigardas vidindaĵojn de la belega hungara ĉefurbo Budapeŝto. Surŝipe okazas la interamikiĝa gaja vespero, kiun sekvas ekskursoj, vojaĝoj al la plej interesaj lokoj de Hungario. Le eventualan varmegon de Aŭgusto la VIS-anoj povas mildigi en la agrablaj ondoj de Balaton. La ŝanĝema vasta akvo de la „Hungara Maro” plezurigas la rigardantojn kun velŝipoj, ĉirkaŭantaj montoj en variaj formoj. La organizantoj de VIS inventeme surprizas ĉiujare per aliaj programeroj la afable invitatajn partoprenantojn.

5a VINTRA ESPERANTISTA FERIO (Budapest, 1975—12—28—1976—01—02)

Estas jam famkonata jarfina aranĝo de la Budapeŝtaj esperantistoj. Budapeŝto, la „perlo de Danubo” allogas ankaŭ vintre esperantistaron, kiu volas adiaŭi la malnovan kaj saluti la novan jaron en internacia medio. La iluminitaj parlamentejoj, fiŝkaptista bastiono, fortikaĵo, monumento de libereco ĉiam denove ravas la noktajn vizitantojn de la urbo. La graciaj pontoj super la Danubo nepre alvokas ĉiun gaston. Muzeoj, galerioj kun altnivelaj ekspozicioj atendas la interesigantojn. La programo ofertas ankaŭ prelegojn, filmoprezentojn Esperante. Peraŭtobusa ekskurso variigas la programon. La kulminon de la Ferio prezentas la Silvestra Balo, kiam noktmeze kun ĉampanjo tintigas la partoprenantaro apud la sono de la „Espero”.

Laŭ la sugesto de UEA la teritoriaj komitatoj de HEA en landlimaj urboj aranĝas internajbarajn esperantistajn renkontiĝojn. Plurjaran tradicion havas jam kaj ankaŭ en 1975 kun pliriĝigita programo atendas gastojn: GYÖR por 1975—02—01/02 kun Esperanto-balo kaj PÉCS por la 22a kaj 23-a de Februaro kun internacia vespero en la kadro de la SEMAJNO de INTERNACIA AMIKECO.

La Turisma Komisiono de HEA (7601 Pécs 1. Pf. 2.) eldonis komunan invitilaron kun detalaj informoj pri la prezentataj internaciaj Esperanto-aranĝoj sub la titolo:

HUNGARLANDO INVITAS VIN en 1975.

E. P.



Malsato en Afriko, 1974.

Granda humanista pentristo

En la lasta aŭtuno ne ĉiutaga evento vekis eksterordinaran atenton en Hungario: talenta pentristo-grafikisto, János Orosz oferdonis sian verkaron, kreintan ĝis tiam, por la malsata loĝantaro de Afrikaj landoj. Estis multaj, kiuj surpriziĝis, tute ne komprenis ĉi tiun geston, kvankam la motivoj, kiuj inspiris la estimindan, humanisman agon, povas diveniĝi facile.

János Orosz naskiĝis en 1932, Budapeŝto; dum la jaroj de mondmilito ankaŭ li povis koni la malsaton, kaj vojaĝante en aliaj landoj, li interparolis multfoje kun afrikanoj. Kaj la lasta motivo: en la televido li vidis dokumentfilmon pri la malsatantoj de Afriko. (Ni prezentas ĉi tie bildon: patrino kun sia infano. Ni povas doni al ĝi la titolon: La Afrika Madono — ĉu ne?) Nu, mi opinias, ke vi, karaj legantoj, bone komprenas la rolon de tiu fina fazo.

Kion povas fari pentristo, kiu sentas, ke en nia epoko jam ne sufiĉas nur kunsenti, kompati la malproksimajn malsatantojn, sed oni devas, eĉ necesas agi iel. Li havas nur talenton kaj verkojn — do li oferdonis sian verkaron, 119 pentraĵojn kaj 327 desegnaĵojn!

La Hungara Ruĝa Kruco petis la Entreprenon por Komisiaj Varoj aranĝi la interesan kaj nekutiman aŭkcion en Budapeŝto. Inter la pasiaj kolektantoj estis troveblaj agentoj de fabrikoj, institutoj, laborbrigadoj, kiuj aĉetis multajn pentraĵojn, grafik-aĵojn, kaj pagis tuj ĉe la kasoj.

La Hungara Ruĝa Kruco por la finsumo aĉetis nutraĵojn, medikamentojn por la malsatantoj de Afriko. — Ĉu ĉio ĉi estas multa aŭ tre-tre malmulta? Ankaŭ vi pensas, kiel sciis la oferdona hungara pentristo, ke ĉi tiu gesto estas vere: guto en la maron. Kaj tamen: oni devas kredi, ke la gesto de János Orosz estis tia ago, kiu ankoraŭ necesas eĉ en nia moderna epoko. Ni devas esperi, ke estos aliaj artistoj en Hungario kaj en eksterlandoj, kiuj emos, kuraĝos sekvi la ekzemplon de Orosz. Kaj ni devas esperi, ke ne nur artistoj kaj diversaj personoj, sed la pli riĉaj landoj, registaroj sekvos la grandan humanisman geston. Car solvi definitive la pezan, nuntempan problemon kapablas nur unuiĝo de la landoj: nobla decido necesas fare de la Unuiĝantaj Nacioj.

MIHÁLY GERGELY

Portreto — Pentraĵo de János Orosz.



Virkapo, 1968. — Desegno de J. Orosz.





Raymond Schwartz:

Laŭ mia... ridpunkto

(1970)

Estis homo, kiu neniam fumis. Lia sola pasio estis aŭtomobiloj. Li aĉetis la plej novan, plej perfektan, kun karoserio kapabla mirigi eĉ usonan magnaton. Ĝi estis memkompreneble ekipita per ĉiuj rafinaĵoj de l' progreso. Sur ĝia panelo troviĝis, inter ĉiaspecaj ilettoj, ujettoj, aĵetoj ankaŭ faldebla duŝilo, aŭtomata bideo kaj ĉio kaj ĉio.

La posedanto de tia aŭtomobilo kun tiom da utilaj ilujaĵoj nete lokitaj, ĉiu en sia fako, estis senfine kontenta kaj prave fiero pri la avantaĝa plejplejeco de sia akiraĵo... ĝis, unu tagon, aperis siaspeca specialisto, nome kaj guste fakulo pri fakoj, kiu ekzamenis la panelon en ĉiuj detaletoj kaj fine konkludis:

„Hm... Hm...”

„Hm... hm... kio? Kio ne glatas?”

„Sinjoro, ĉu vi neniam uzas la cindrujon?”

„Kial uzi la cindrujon? Mi neniam fumas!”

„Egale! Vi devus uzi la cindrujon. Eltiru ĝin, tenu ĝin, la fundon alsupre kontraŭ la lumo, kaj kun iom da bonvolo vi rimarkos trueton, tra kiu lerta metiisto povus enŝovi la pinton de pinglo. La cindrujo ne estas hermetika!”

Kaj tiel, pro prifaka pedanteco, detruigis la pura plezuro de homo,

kiu — ĉar nefumanto — neniam bezonos cindrujon.

Al kio mi celas?

Antaŭ kelkaj monatoj aperis tiu longe atendata PIV (Pene Ilustrita Vortaro), verkego kompleta en... volumeno nekutima en Esperantujo. Kaj jam la specialistoj de l' cindrujotruetoj svingis siajn pinglojn. Apenaŭ la giganto surteriĝis, kiam ĉarmaj liliputaninoj — ankaŭ ili ĉiam ad... monavidaj — ĝojkrie tiklis plimalpli karese la kirason de l' giganto por malkovri la kritikeblan pinglopint-pikpunkton. Tiaj estas la homoj. Ĉiu el ni, kun-aŭ-sen sia kon-kaj-sci', kovas super la kerno de kritikisto, kaj malkovri al la mondo tian latentan talenton estas tentante! Paradi inter la vulgara kokinaro kiel pavo, kun la epiteto „pli erudicia ol PIV”, tio garantias admiron al ĉiu PIV-pavo.

Kaj tiel, per recenzoj senchavaj nur inter memfidaj samfakuloj, oni makuletis la serenajn ĝojon de neŭtrala PIV-posedanto, kiu meritis tamen esti traktata kun tiom pli da takto, ke li pagis altan sumon por sia akiraĵo. Dudek ses dolaroj ne troviĝas ĉiutage en via leterkesto. Ankaŭ tia prezo estas nekutima ĉe ni. Ne mirige do, se antaŭ nelonge prudenta aĉetemulo, aŭdinte la prezon, demandis la vendiston, ĉu tio ne estas... prez-eraro? La vendisto, certe miskompreninte, respondis, ke la „prezeraroj troviĝas interne”. Interne la prezeraroj estas tre malmultaj. Tion oni povas bedaŭri. Mi mem ne estas kontraŭ prezeraroj. Ofte ili estas por leganto la sola distraĵo en seka teksto kaj samtempe ĝojiga atesto, ke ankaŭ la kompostisto estis distrita!

Pri unu el la malmultaj prezeraroj oni atentigis min de flanko, al kiu ĝenerale mi fidus nur duone. Mi do kontrolis mem kaj nun demandas min, kiel mi povos prezenti la aferon al vi en tia ma-

niero, ke mi ŝokos neniun, ĉar la eraro aŭ neeraro troviĝas en la difino de vorto markita kiel „triviala” kaj kun vinjeto signifanta „neologismo por ĉiutagaĵo”.

Nun, kiamaniere komuniki al vi la fivorton ne nomante ĝin? Eble per tre diskreta, deca kaj tamen ne miskomprenibla aludeto, kon-diĉe, kompreneble, ke troviĝos ankoraŭ tia taŭga lumigilo en mia... aludetskatolo.

Jen: Ekzistas vortoj tiel trivialaj, ke honesta buŝo rifuzas ilin elparoli. Kaj aŭdi ilin estas turmento por ĉastaj oreloj. Mi scias pri pruda damo, kiun ŝokas eĉ vortoj en si mem tute decaj, nur pro tio, ke unu parto de tiuj vortoj, se izolita, elvokas abomenaĵon. Tiel, ekzemple, la bona damo tre ĝenate ekruĝiĝas ĉiufoje, se oni prononcas antaŭ ŝi la senkulpan *artifika*. Stulte, ĉu ne? Pro tio, antaŭnelonge iu konato ŝia, kiun agacis tia sinteno, demandis seke: „Ĉu do por vi enestas io ŝoka en la vorto artifika?”

Kaj same seke la damo respondis: „Jes... artiŝoka!”

Estas supozeble, ke nun ĉiuj lanternoj eklumiĝis. La fivorto estas senmaskigita. Fi al ĝi! Kaj jen ĝia difino en PIV: „Seskuniĝi kun virino.” Kaj ĉi tie disiĝas la kompetentuloj. Dum unuj vidas en tiu teksto evidentan prezeraron, aliaj salutas en ĝi la bonvenan informon pri nova tekniko. Nova tekniko ankoraŭ ne patentita. Eĉ ne en Skandinavio! Sed unuj kaj aliaj konkorde bedaŭras, ke la ilustritaj tabeloj de PIV ne precizigas la situacion.

Rilate al tiu Skandinavio, ĵus menciita, estas kurioze konstati, ke ĝuste tiuj glaciaj norduloj montriĝas nun sur la erotika-pornograf-merkato tiel sukcese inventemaj, ke ili kapablis ne nur plivigli la aktivecon de ĉiuj centraj oficejoj, liverante al la tuta mondo siajn sekssport-art... tiklojn, sed

LEONID MARTINOV

MARTO

*Mart' ludas ŝercojn iom dornajn.
Ermito — barbegul' en pent' —
vidas en flako diablokornojn
anstataŭ kornoj de krescent'.*

*Kaj, kun agac' pri disciplino,
singardo, spertoj de la viv'
ribelon planas lernantino
kontraŭ mentoroj kaj edif'.*

*Mart' amas fantaziulinojn,
jen kial do en lasta sald'
dominas niajn kor-inklinojn
monat' en svingiĝanta palt',*

*Mart' kiu eĉ en sonĝomezo
produktas iom da komik',
kiam jam ĉiu printemp-tezo
estas solvita de l'praktik'.*

*Kaj eminente ni komprenas,
ke majon sekvis tuj juni',
post ĝi juli' — kaj ĉirkaŭprenas
rikoltan grenosakon ni.*

*Kaj rezoneman maturaĝon
veninte ĉe l'vespero-ven',
oni sidiĝos ĉe l' kamen',
sed dume havas vi kuraĝon
plandadi flakojn en promen'
kaj kanti, spite al angino,
harligojn pro longec-rekord'.
La mond' dum via kant', birdino,
bacilojn bredas por eksport',
deŭteron stokas kun afablo,
daŭrigas ludon de hazard'...*

*Ermit' en flakoj vidas diablon.
Ho Mart' krescenta, juna Mart'!*

El la rusa: I. ĤOVES.

ankaŭ, plie, inaŭguri proksimajare en Stokholmo la Naŭz-ekscesan Internacian Sekspozicion! Ĉu tio ne estas mirinda sukceso, apenaŭ imagebla? Ja certe! Sed oni devas ne forgesi, ke ĝuste en ilia malvarmega nordo la noktoj estas multe pli longaj ol ĉe ni. Kaj eble ĉi tio klarigas tion.

Kaj nun, se mi ne timus aspekti mem kiel fekunda PIV-pavo, ankaŭ miaflanke mi volonte atentigus pri grava manko en PIV. En ĝi neniuloke oni trovas mencion pri „hipioj”. Sed hipioj tamen ekzistas. Eĉ en nacilingvaj enciklopedioj, kie oni difinas ilin proksimume: „Gejunuloj nespertaj en uzado de tondiloj, ekstravagance aŭ apenaŭ vestitaj, pro kio inter ili oftas mammalvarmumoj alterne kun ternaj „ha-ŝiŝ! Ha haŝiŝ!” (Je via sano!) La hipioj malrespektas la tradician muzikon kaj provas mem novajn kantojn. Sed tiuj provokantoj estas ĝenerale sendanĝeraj”. — Nu, sendanĝeraj certe, kaj tamen, pro unu tia kanto, dumkongrese en Vieno oni preskaŭ batalis. Surbaze de stulta miskompreno. Kelkaj delegitoj plendis, ke ĉiumatene, sub iliaj fenestroj la hipioj komencis sian himnon per la vortoj „Fi-delegitaro kantu kun ni!” Sed enketkomisiono baldaŭ konstatis, ke la teksto diras „Fidele gitaro kantu...” kaj ĉio glatiĝis. Sed tio montras, unu fojon plie, ke antaŭ ol batali estas saĝe enketi. Krom tio la hipioj vege-

tas inter vegetaĵoj. Mem molaj primoluloj, ili estas floramantoj, pacaj, revemaj girlandanoj el Hederlando. Iliaj solaj armiloj estas sun- aŭ pluv-umbeloj. Ili malaprezas nian monsystemon kaj preferas komerci surbaze de... anemoneroj, aŭ ili proponas al vi, se vi estas psike delikata fraŭlino, interŝanĝi tulipojn kontraŭ... du lipoj! Ili estas bonkoraj kaj, kvankam mem senhejmaj, ili ĉiam estas pretaj gastigi kiuĵn ajn ĉe si. Kiam ili aŭdis pri tiu malfeliĉa Marihuana, la belnoma indiana... kanabino, kies gepatrojn internacia polico persekutas, ili tuj adoptis ŝin. Ĉu tio ne estas bela?

Feliĉa Esperantujo! Tie oni ankoraŭ nenion scias pri bomboj kaj dinamitmanioj, nek pri devoĵigado de aviadiloj! Nur iam-tiam, en la intimeco de klaĉujo, oni aŭdas ion pri devoĵigado per avidaj iloj de iu kongresanino, cetere kaj ĝenerale ĉiam konsentema. Sed kiu, ĉe ni, havus la komikan ideon reteni ostaĝe en sia ŝranko puraniman delegiton por elpremi el nekomprenebla estraro malaltigon de kotizoj? Aŭ kiu, ĉe ni, minacus eksplodigi la tutan Fundamenton nur por devigi la Akademion al nuligo de certa decido? Vere, krom sinjoron Lobut mi vidas neniun.

Ĉi tie, karaj miaj, finiĝas la tro longa serio de miaj... ridpunktoj.

Estas saĝe, ĝustatempe enterigi, kion oni ne povas... eternigi.

*

Raymond Schwartz (1894—1973) la iama „terura infano” de la E-movado meritas aprecon pli detalan kaj seriozan ol oni povas fari en tiaj notoj kaj tio restas ŝuldo de HV, al kiu li eĉ kontribuis per noveleto. Siatempe li estis fervora kunlaboranto ankaŭ de Literatura Mondo. Provizore ni adiaŭas lin per partoj el la supra ŝerca raporto, kiun li verkis en la samnoma serio kiel lastan por Sennacieca Revuo. Lia sprito en ĉi tiu peco eble fajreras jam pli lace ol en la antaŭaj, sed des pli emocia ĝi estas, se ni pripensas, ke li verkis ĝin jam malsane. Pro tio li rezignas fine de la artikolo pri la plua daŭrigo de la serio, kaj, vere „schwartzte”, eĉ tiun rezignacian adiaŭon li komunikas al ni per vortludo.

La lasta numero de Norda Prismo publikigas de Reinhard Hauptenthal belan memoraĵon pri la mortinta aŭtoro, kun plena bibliografio de liaj verkoj. El tiu listo oni povas vidi, kiel riĉan heredaĵon li postlasis: krom 31 numeroj de la spritaĵgazeto PIRATO, novelvolumojn, du romanojn, multajn gajajn poemojn, sed ankaŭ verketon prigramatikan. Libere kaj leĝere li eksperimentis per la ludeblaĵoj de la lingvo kaj per lia ludado la lingvo riĉiĝis kaj viviĝis pli kaj pli. Omaĝon al lia memoro.

Esperanto en la spegulo de la moderna lingvoscienco

Ci tiu artikolo estas kompilita baze de la analizo de du verkoj: 1. „La nacia kaj internacia en la literaturo, folkloro kaj lingvo”, eld. „Scienco”, Kiŝinev, 1971., Studoj. Ruse. 2. „La lingvo kaj la kulturo, lingvo-landkono en la instruado de la rusa kiel fremda lingvo”, eld. Moskva Universitato, 1973. Ruse. — Pri la libroj aliaj de referencitaj aŭtoroj informas laŭdezire la artikol-aŭtoro.

La internacia potencialo

Ce la renkontiĝo de du lingvoj (gepatra kaj fremda) konfliktas ne nur du lingvosistemoj, sed ankaŭ la du „kulturoj”, reprezentataj de la du diversaj lingvoj.

1. Pri la rilato LINGVO/KULTURO en la lasta tempo ĉiam pli intensive okupiĝas ankaŭ la lingvistiko, precipe ĝia elformiĝanta nova branĉo: la soci-lingvistiko (resp. etnolingvistiko). En la literaturo estas distingeblaj tri tendencoj en la solvado de tiu ĉi problemaro:

- a) la primareco de la lingvo;
- b) la universaleco de la kulturo;
- c) la sintezo de la tendencoj a kaj b

1/a. Laŭ Humboldt kaj liaj sekvantoj („novhumboldanoj”) en la dupoluso LINGVO/KULTURO la decidan rolon ludas la lingvo, ĉar la lingvo estas la kondiĉo de la kulturformoj: la pensmaniero de la membro de iu etna-kultura komunumo dependas de la lingvo kaj nur de ĝi:


„En ĉiu lingvo kuŝas mondkoncepto... Ĉiu lingvo tiras rondon ĉirkaŭ la popolo, al kiu ĝi apartenas, el inter kies limoj oni povas eliri nur ti- am, kiam oni transiras en alian rondon; la lingvo de la popolo estas ĝia spirito, kaj la spirito de la popolo estas ĝia lingvo” (W. Humboldt).

Laŭ tiu koncepto ĉiu lingvo, sekve ĉiu kulturo, estas strikte specifa kaj havas nenian rilaton kaj tuŝajn surfacojn kun aliaj.

1/b. La dua teorio estas la kontraŭo de tiu ĉi koncepto. Ĝi deklaras, ke la pensmaniero de ĉiu homo estas esence tia sama, kaj la lingvoj estas nur diversaj kodoj de la samaj enhavoj. Laŭ tiu koncepto la lingvo estas tute sendependa de la kulturo: la lingvo a povas perfekte kaj senmanke servi la kulturon B.


1/c. La tria koncepto, kvazaŭ sintezante la du antaŭajn, eliras el la fakto, ke en du renkontiĝantaj kulturoj kaj lingvoj estas kaj specifaj, kaj komunaj elementoj.

La kulturoj A kaj B havas speciajn (naciajn) elementojn (a resp. b) kaj komunajn internaciajn, universala-ajn (ab).



2. La universalaj kulturaj elementoj elformiĝas dum la lingvaj-kulturaj kontaktoj (culture contacts): ju pli intensivaj estas la kulturaj kaj lingvaj kontaktoj, des pli vasta estas la rondo de tiaj elementoj. La evoluado (ŝanĝiĝo) de certa kulturo sekvas adekvate la evoluado (ŝanĝiĝo) en la proporcio de naciaj/internaciaj elementoj: la lingvo a esprimas ĉiam la kulturon A sed kapablas ĉiam pli esprimi el la kulturoj B, C, D... — ĝuste tiun segmenton, kiu estas komuna, ĉar universala, ĝenerale-homa.

En la interkruciĝanta centro de kontaktantaj kulturoj elformiĝas kultura komplekso — internacia laŭen- have, kiu laŭforme prezentiĝas en la diversaj lingvoj en la formo de internaciaj-universalaj elementoj (interonimoj, leksikaj respektive gramatikaj universalioj). Kune kun la vastiĝo de komuna kerno ĉiam reduktiĝas la specifa-nacia (folklor) periferio, t.e. la nombro de senekvivalentaj elementoj de la lingvo mal- kreskas.



Se en la instruado de iu nacia lingvo kiel fremda lingvo oni devas ĉefe priatenti la „netradukeblajn” elementojn (ĝuste tio estas la objekto de la landkono) — la internacia potencialo celas koncentriĝi al la universalaj kulturaj kaj lingvaj elemen-

toj. Tiel, programante materialon de iu lingvo a reprezentanta la kulturon A al lernantoj, kies gepatra lingvo estas b, reprezentanta kulturon B — oni devas priatenti kaj en- programigi la diverĝajn specifajn elementojn. Kontraŭe, se oni konstruas universalan programon de la Internacia Lingvo, oni devas enpro- grammi ĉefe tiujn elementojn, kiuj estas komunaj por ĉiuj kulturoj kaj lingvoj.

3. Laŭ Vereŝagin-Kostomarov la senekvivalenta leksiko de iu lingvo (en ilia kazo de la rusa) estas grupigebla jene:

- a) vortoj, esprimantaj la reala-jojn de la socipolitika vivo (en la kazo de la rusa lingvo la t.n. „sovetismoj”);
- b) vortoj, esprimantaj la novan vivstilon, vivmanieron;
- c) vortoj, esprimantaj tradiciojn;
- d) la specifaj historiismoj;
- e) la frazeologismoj;
- f) la folklorismoj;
- g) la regionismoj.

Tiaj vortoj, ekz-e kiel KOLĤOZO, ĈARDO, KIMONO estas nur transliterigeblaj kaj interpreteblaj, difineblaj sed netradukeblaj. Nur la konan- to de la etna kulturo komprenas ilin sen klarigo.

4. La vastskala interkultura komu- nikado estas ebla pro la ekzisto de la internacia potencialo. (Kojevnikov 2). La internacia potencialo ekestas, ĉar la lingvo kreskas sur la grundo de la unueca naturo, de la unueca empiria perceptado de objektoj kaj fenomenoj, kiuj estas kondiĉitaj de la psika-fiziologia homa organismo. Laŭ ĝeneralaj trajtoj unueca reala mondo, ekkonebla sammaniere (ĝe- neraltrajte) far la homa individuo, ebligas transkodiĝi el unu lingvo en alian lingvajn signojn kaj signifojn. La komuna natura komplekso rezul- tigas certan komunan logikon kaj abstraktadon. La internacia poten- cialo, kiel jam menciite, ekestas pe- re de interkultura interkomunikado kaj paralele kun ĝia evoluado pli- vastiĝas kaj akiras interkulturan, in- terlingvan, internacian, universalan karakteron.

La kontaktoj (interkulturaj-inter- lingvaj) en la koncepto de la moder- na homo, estas ĉiam ideologie pozi- tivaj: ili helpas la plifortigon de a- mikeco kaj solidareco inter la ho- moj. Nenia kulturo povas nuntem- pe fruktodone evolui, se ĝi enfermi- ĝas inter siaj geografiaj kaj psikolo- giaj limoj, se ĝi izoliĝas de la kul- turo de aliaj nacioj. Antaŭ niaj oku- loj disvolviĝas la procezo de la ĉiam

PRELEGO

Min trafis speciala honorigo. En la lastaj tagoj en Budapeŝto kunvenis esperantistoj el ĉiuj partoj de la Mondo: germanoj, svedoj, aŭstralianoj, eĉ ĉino estis inter ili, kiujn kunligis la komuna helplingvo, tiu feliĉa sento, ke ili libere kaj sendepende povas interparoli sen tio, ke ilia vorto ofendus la nacian senton de la alia.

Kelkaj miaj libroj, kiuj aperis esperantlingve, rajtigis min kroĉigi al ili. Ili akceptis min ĉarme, kaj la hungara organizantaro turnis sin al mi kun la honoriga peto, ke mi ĉestu koncerton, aranĝotan vespere en intima klubejo por distri la interesan socion.



Poste, kiam mi jam ĉeestis, al iu venis penso, ke mi prelegu unu el miaj noveloj.

Kompreneble en Esperanta traduko, fare de la aŭtoro Bodó. Nu, nun mi jam devas ion konfesi. Mi ne komprenas la lingvon Esperanto. Strange, — ĉu ne? — ke mi estante entuziasma adepto de la movado, ne komprenas ĝin, eĉ pli strange, se ni konsideras, ke ellerni Esperanton oni povus dum kelkaj tagoj — ekskuzi min mi povus nur per tio, ke ĝuste la entuziasma propaganda agado kaj la partopreno en diskutoj pri ĝi okupis min tiom, ke mi jam ne havis tempon lerni la lingvon mem.

Nu, sed faras nenion, mi pensis, ja la lego de la esperantaj literoj estas tiel facila kaj logika, ke mi kuraĝe povos laŭtlegi iun ajn tekston antaŭ mi starantan. Neniu rimarkos la trompon.

Tuj mi surpaŝis la podion, kaj komencis laŭtlegi la novelon.

Neniam mi havis pli strangan travivaĵon. Eĉ unu vorton mi ne komprenis el la teksto, legata de mi. Mi



memoris nebule la enhavon de la novelo — aŭ pli ĝustadire mi nur opiniis memori. Ĝis la mezo mi pensis, ke mi legas humuraĵon, kaj pro tio mi sonigis leĝeran kaj gajan voĉon. Sed neniu ridis. Oni aŭskultis min serioze kaj kortuŝite. Kelkaj kapjesis, aliflanke de la publiko iu prenis

nastukon kaj levis ĝin antaŭ la okulojn. De unu alia vizaĝo mi povis legi kvazaŭ riproĉon (kompreneble hungare, ĉar la vizaĝojn mi kutimas legi ĝis nun nur hungare) pro mia cinika kaj aroganta akcentmaniero.

Tiam la afero iĝis por mi suspekta, mi ŝtele ĵetis rigardon al la titolo de la novelo, kaj je mia grandega teruro mi vidis, ke mi legas ĝuste tiun mian novelon, kiu havas la plej malgajan temon.

Tuj mi ŝanĝis voĉon: mi daŭrigis en funebra, pezmova tono la prelegon.

Je mia fatalo!

En la unua vico iu ekridetis grimace, pluraj laŭte ridis.

Svito eksidis sur mian frunton. Nun jam vere mi ne sciis, kiel statas la afero. Imagu surdan virtuozon, kiu ne aŭdas sian muzikon!

Je la fino de unu frazo oni komencis aplaŭdi. Tuj mi finis la prelegon, starigis, kaj min klinis, kiel iu fininta la prezentadon per sukcesa bravuro!

Ĉiu gratulis, oni fakte festis min, dirante, ke mi estas genia laŭtlekanto.

Post kiam mi modeste residiĝis sur mian lokon, kaj rigardis la libron (esperantlingvan antologion) ankoraŭ malfermitan enmane, nur tiam klariĝis, ke en tiu jam kritike menciita momento mi embarase foliumis tri paĝojn, kaj anstataŭ mia propra malgaja novelo mi legis la finon de sukcesa humuraĵo de Ferenc Molnár.

Tr.: M. FEJES

(Unuan fojon aperis en la tagĵurnalo „Pesti Napló” en 1931, reprenis ĝin ankaŭ Eszperantó Magazin, laŭ kies teksto pretiĝis ĉi traduko.)

pliproksimiĝanta nacia al internacia: ĉiu nacia kulturo evoluas enspirante en sin la plej pozitivajn elementojn de aliaj kulturoj. Tiu ĉi internaciigo de kulturoj respeguliĝas ankaŭ en la lingvoj — plej konkrete en la leksiko. Estas memkompreneble, ke (la ĝis nun neglektata) problemaro de interonomoj kaj universalajoj fariĝis tre aktuala: „Lige al la ĉiam kreskanta intereso al la demandoj de interlingvistiko, signifan rolon ludas la eŭropaj internaciismoj, ĉar la internaciaj artaj lingvoj, kaj speciale Esperanto, konstruiĝas baze ĝuste sur tiuj ĉi internaciismoj” (Deŝerijev, substrekitaj de mi, Sz.)... „La

praktiko de lingvo-strukturo kaj aplikita lingvistiko pravas la neceson orientiĝi al al ekzistantaj interlingvaj normoj, inter ili al la internaciaj elementoj en la diversaj lingvoj. La kreado kaj normigo de literaturaj lingvoj, la laboroj koncerne la „parolkulturon”, la normigo de la terminologio, la kreado kaj normigo de skribsistemoj kaj optimumigo de ortografioj, same: la lingvolernado, la tradukado — kaj la homa, kaj la maŝina — la kreado de internaciaj helplingvoj — ĉiuj ĉi taskoj estas solveblaj, nur se oni konsideras la rilatojn, ekzistantajn inter la lingvoj, la internaciajn elementojn, vi-

vantajn en la lingvoj.” (Akulenko, substrekitaj de mi, Sz.).

Resume

El la ekzemploj evidentiĝas, ke la nuntempa scienca literaturo ne povas plu preteriri la fakton, ke Esperanto ekzistas kaj funkcias. Evidentiĝas, ke la ĉiam plivastiĝanta universaleco de kulturoj iom post iom kreas tiun socian bazon por la Internacia Lingvo, kiu rolos kiel kvazaŭ-etna medio por ĝi.

D-ro István SZERDAHELYI



Saci II. infanĉambro

La dimensioj de la garnituro: 4082 × 1199 × 1199/454 mm.


La ŝrank-kombinaĵo enhavas unu vestŝrankon, du sidiletojn kaj unu komponenton kun pordo, tirkesto kaj skriboplato. La komponentoj, diference de la ordigo, videbla sur la desegnaĵo, estas kunmunteblaj ankaŭ en alia kunmetado.

La vestŝranko estas provizita per du, flanke malfermeblaj pordoj, dividita per vertikala rando, en unu triono bret-hava, en du trionoj kroĉil-hava. La kroĉil-hava parto entenas glithokaron, tireblan perpendikle sur la glataĵon de la ŝrank-kombinaĵo.

La du ŝrank-kuŝiloj servas en fermita stato kiel foteloj, malfermite kiel kuŝlokoj. La dimensio de la kuŝilo estas taŭga ankaŭ por kuŝejo de plenkreskuloj, ekzemple mebligi somerdomon. Post la eliro de la kuŝiltirkesto la duobla laticela somiero estas malfermebla du-direkten kaj la dorsapogilo estas lokigebla por fariĝi kapapogilo. La kuŝil-tirkesto kaj la ŝranko-parto malantaŭ la dorsapogilo, provizita per malferma pordo, estas uzeblaj por rezervi la litajon.

La skriboplata komponento estas enkorstruebla inter la du ŝrank-kuŝilojn, aŭ — en alia kunmetado — inter unu el la ŝrank-kuŝiloj kaj la pord- kaj tirkesthavan ŝrankon. La alteco de la skriboplato estas ŝangebla laŭ la kresko de la infano ĝis la alteco 594—754 mm-oj. La breton super la skriboplato kun la aldonitaj ŝrankoj oni povas fiksi en la dezirata alteco.





Ŝrank-kombinaĵo „Daisy”

La dimensioj de la ŝrank-kombinaĵo: $3497 \times 1804 \times 435$ mm.

La ŝrank-kombinaĵo konsistas el 4 samprofundaj komponentoj.

La vestoŝranko estas provizita per du „flankmalfermigaj” pordoj, en ĝia interna parto troviĝas ĉapeltenilo, eltirebla perpendikle sur la vand- kaj frontglataĵon, kaj du pecoj da glitvesthokaroj. La ŝrankpartoj estas kunkonstruitaj, en la supera kaj malsupera kvaronoj de la unua komponento provizitaj per po 2 malfermaj pordoj, meze malfermebla pordo malsupren (Barŝranko).


La dua komponento havas „flankmalfermigajn” pordon, (3×2) en la meza kaj supera partoj kun bretoj, konvenaj rezervi tolajon.

La tria komponento estas pli mallarĝa ol la antaŭaj du, estas 582 mm-ojn larĝa. En la supera parto ĝi estas „malfermporda”, meze kun malfermita breto, malsupre kun tri tirkesto.

La ŝrank-kombinaĵo estas bone lokigebla ankaŭ en etaj loĝejoj, varia, kaj ebligas vastan lokon por ŝarĝado. La speciala dimensio kaj reprezentativa aspekto ebligas ĝin mebli loĝoĉambrojn, oficejojn, klubejojn.

La elegantan kaj bone uzeblan „Daisy” (junularan) ŝrankkombinaĵon la planistoj destinis unuavice en la ĉambro de junaj geedzoj.

La lignosimila artefarita folio faras konvenan transiron al la aliaj mebloj de la ĉambro, kiuj estas supozeble plakajkovritaj.





La „Granda Preĝejo” en Debrecen

La 18-an de oktobro estis la 30-a detreveno de tio, ke la hungara urbo Debrecen liberiĝis, kaj, por tion soleni, oni aranĝis en la urbo serion de festoj. En la liberiĝa tago antaŭtagmeze, la urba konsilio kun la Patriota Popolfronto faris festan kunsidon, kies prezidantaron formis: *Gyula Kállai*, prezidanto de la Popolfronto kaj parlamenta deputito de la urbo Debrecen; *dro László Orbán*, ministro de kulturo; *György Sikula*, departementa sekretario de la Partio; *dro István Amburs*, prezidanto de la departementa konsilio, fine *L. J. Vasilev*, soveta kolonelo, kiu en la liberiĝa batalo la unua eniris kun sia kompanio la urbon Debrecen. Posttagmeze oni inaŭguris la novan palacon de la Muzika Akademio „Ferenc Liszt”, kaj solene metis la fundamentan ŝtonon por la konstruota Palaco de Kulturo. Vespere, en la teatro Csokonai okazis festa prezento. Debrecen, en sia Granda Preĝejo kalvinana, dufoje donis lokon al sendependa hungara parlamento: en 1849, kiam oni tie detronigis la Habsburgan dinastion kaj elektis Ludovikon Kossuth kiel regnestron, kaj en 1944, kiam tie formiĝis la nova demokratia hungara registaro.

La kvara Mondkongreso de Ekonomiistoj, tenata en Budapeŝto, finiĝis plensukcese. En la ferma kunsido la gvidantoj de la dek faksekcioj raportis pri la diskutrezultoj. Poste la Usona profesoro Fritz Machlup, prezidanto de la Internacia Ekonomia Asocio, resumis la moralajon de la kongreso. Inter aliaj, li emfazis, ke nun unufoje la kongreso estis aranĝita en socialisma lando. Tiu fakto signas, ke Oriento kaj Okcidento plue deziras plibonigi la ekonomiajn interrilatojn kaj tiamaniere la landoj povos progresive fruktuzi la avantaĝojn de la internacia labordivido. Laŭ lia sperto, multaj misopinioj refutiĝis per la vido de la veraj faktoj; la elformiĝo de amika etoso certe estos bazo por plua fruktodona kunlaborado.

Antaŭ du jaroj, la Grot-terapia Komitato de la Internacia Speleologia Unio aranĝis sian duan kunsidon en Budapeŝto: tiam la ĉeestantaj kuracistoj, biologoj, grot-esploristoj kaj klimatologoj konstatis, ke pluraj specialaj grotoj estas taŭgaj resanigi la malsanojn de la spir-kaj mov-organoj. Antaŭ nelonge oni aranĝis la trian kunsidon en Aŭstrio, en la mondfama kuraĉloko Badgastein. En la fakkunsidoj oni prezentis la kuracmetodojn en la resanigaj grotoj, kien lithavaj elektraĵoj trajnoj veturigas la pacientojn. La radon- kaj vapor-enhavo de la aero kaj la konstanta 37–41-grada temperaturo estas kuracpovaj por la degeneraj kaj reŭmatis-

panoramo

maj morboj. Fakuloj el Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Pollando, ambaŭ Germanioj kaj Italio konigis siajn spertojn. La hungaraj fakuloj anoncis, inter aliaj, la plej novan malkovron en la urbo Tapolca; tie, sub la urba hospitalo, troviĝas similaj grotoj kiel en Badgastein. Oni jam instalas lifton inter la groto kaj la hospitalo; tiamaniere la malsanuloj povas esti kuracataj en agrabla medio, sendepende de la ekstera vetero, sub medicina kontrolo. La Hungara Sanitara Ministerio jam dekretis, ke la resanigaj grotoj de la lando, kiel la hospitaloj, estas tute senpage je la dispo de ĉiu civitano laŭ kuraĉista propono.

Kunlabore kun la helpo-programo de UNESKO, internacia biologia perfektiga kurso okazis en la urbo Szeged. La Internacia Biologia Esplora Centro dissendis ĉ. 2000 invitleterojn en ĉiujn mondopartojn. La temo de la kurso estis la kerno (nukleo) de la ĉeloj kaj la rezultoj de la plej novaj esploroj. Estis interese, ke la invititaj biologoj estis ĉefe junaj kolegoj, tiel ke la averaĝa aĝo de la partoprenantoj estis 30 jaroj. La prelegantoj-profesoroj venis el 20 landoj, interalie el Britlando kaj Usono. La internacia etoso bone efikis por la plivastiĝo de la scienca horizonto. Montriĝis vojoj al novaj esplor-metodoj. Precipe la junaj biologoj, venintaj el Afriko kaj Azio, el la tn. „tria mondo”, montris okulfrappe grandan interesiĝon pri la ĉel-esplorado.

La Internacia Biologia Esplora Centro en Szeged



panoramo

En Parizo, ĉe la 18-a kunsida periodo de la asembleo de UNESKO, la hungaran universitatan profesorinon Magda Jóboru oni elektis aklame prezindanto de la kunsido. Magda Jóboru estas prezindanto de la hungara UNESKO-komitato. Unuafoje okazis, ke la Eduka-Scienca-Kultura organizo de UNO elektis kiel prezidanton la reprezentanton de Hungario. En la kunsido oni akceptis inter la membrojn la reprezentantojn de la Korea Demokrata Popolrespubliko kaj de la Respubliko San Marino, ĉi-maniere la nombro de la membroŝtatoj kreskis je 134. La demisianta prezidanto de la antaŭa kunsid-periodo, la japana profesoro Hagivara, aprecis la meritojn de dro Magda Jóboru kaj deziris al la prezidantino kaj al Hungario multajn sukcesojn en la sekva periodo.

Ce terkulturado, apud la vilaĝo Dunaszekcső, troviĝanta en la teritorio de la antikva Panonio, oni trovis bronzan skulptaĵon en la tero, kaj evidentiĝis, ke ĝi figuras la Romian cezaron Marcus Aurelius, aŭtoron de la libro „Pensoj por si mem”. La trovaĵo vekis ekscitiĝon ĝeneralan. Interese, ke la statuoj estas bronza, ne marmora, kiajn kutime oni trovis en Panonio. En la urbo Pécs (antikva Sopianae) nun la arkeologoj de la muzeo „Janus Pannonius” per diversaj sciencaj metodoj esploras originon kaj proprecojn de la skulptaĵo.

Marcus Aurelius ĉe la Danubo



En Parizo, en la domo de la Hungara Ambasado, oni aranĝis akcepton por la honoro de la Hungara Ŝtata Popolensemblo. La fama danĝgrupo rolis gaste en diversaj urboj: en Lausanne, Basel kaj Zürich po kvinfoje, en Brest unufoje, en Parizo dudek-ses-foje. Ĉiokaze sesdek mil spektantoj vizitis la prezentadojn, elektitajn el la plej furoraj program-numeroj de la ensemblo. El la plej longa, Pariza gast-rolado, kiun la ensemblo faris sur la scenejo da Palais des Congrès, ankaŭ la televido dissendis partojn. La ĵurnal-kritikistoj rememoris pri la vivoverko de la antaŭ nelonge mortinta granda hungara koreografo Miklós Rábai, aŭtoro, inter aliaj, de la fama danĝludo „Ecséri lakodalmás” (Nuptodanco el la vilaĝo Ecsér). La ĵurnalo L'Humanité konstatis, ke la programo de la hungara ensemblo estas matura, okulplezuriga, delico-dona al muzikamantoj, kaj ellevis la majstran prezentadon de Rapsodio de Liszt kaj de la franclingva kanto de Trenet. La ĵurnalo Le Monde skribis, ke la hungaroj prezentis spektaklan, harmonian, kolorpompan kaj vigne vivantan programon.

En Budapeŝto, en la strato Budaörsi, jam estas preta la nova turpalaco de la Hungara Scienca Akademio. La evoluo de la scienco necesigas disvolvi sciencajn branĉojn kiuj ĝis nun funkciis en diversaj universitatoj inter magraj cirkonstancoj. La nova esplor-instituto donas lokon al kvin sciencaj grupoj. La unua estas la Matematika Esplor-instituto kun sia grandega biblioteko kaj siaj prelegejoj. La dua estas la Geokemia Esplora Laboratorio, kiu, en la kadro de la Naturscienca Universitato, funkcias por elserĉi la naturajn energiofontojn de la lando. La tria, la Kristalfizika Esplora Laboratorio, interligos la laboron de akademiaj kaj universitataj institutoj. La kvara, la Akustika Esplora Instituto, estas tute nova scienco-branĉo kaj funkciis ĝis nun inter modestaj cirkonstancoj kiel fakultato de la Teknika Universitato. La granda bruego en la fabrikoj kaj sur la stratoj estas ege malutila al la homa organismo; tial la ĉefa tasko de ĉi lasta Laboratorio estas ellabori metodojn por la reduktado de la bru-nivelo. Fine, la kvina, la Esplora Laboratorio de Neorganika Kemo, laboros en la nova kampo de la neorganikaj sintezaj materialoj.

Komp.: Szilárd BÁLINT



STELO

SUDHUNGARLANDA



Belmagyarországi Esperanto Mozgalom lapja

Megjelenik havonta

KÉZIRAT GYÁNT
 Redukto kaj aldonoj:
 „Duna” nyanda, GYULA
 Hungario
 Januaro 1946.
 1-a jaro, 1-a numero

Saluto

Al la kara Leganto!
 Ne la hungara popolo kaŭzis la militon, tamen la popolo suferas ĝian konsekvencojn.
 La popolo suferas, sed semtempe laboras, — konstruas la pil bonan

„PACON
por la Homaro!”

Okazis antaŭ kelke da jaroj. Proksimiĝis Kristnasko. La homoj plenigis per solenaj pensoj. Ĉiu homo atendis ion belan, va-

CENTRALIZO
 kaj
decentralizo

Tiel, kiel estas skibite. Ne centralizo, au desentralizo, sed

Du numerojn de la monata gazeto SUDHUNGARLANDA STELO ni havas dank' al nia redaktorarano Zsolt Gyarmathy: la unuan kaj la kvinan numerojn el 1946. Por la juna, eĉ por la mezaĝa generacio, tiu tempo jam estas preskaŭ nebule historia; tial ni montras al ili la gazeton ankaŭ bilde.

La unua numero, tuj post la liberiĝa jaro 1945, ekscite montras la reviviĝan povon de nia lingvo kaj movado: tre baldaŭ post la frakasigo de la sovaĝbesta reĝimo jen „la esperantistoj en la suda Hungarujo aperas antaŭ la kara Leganto modeste, sed kun forta vivo-volo.” Kaj tiu vorto „modeste” eĉ estas tro modesta: ekzistas multaj naciaj E-gazetoj, kiuj prezentigas en pli humila aspekto, ol tiu gazeto kvazaŭ ĵus emerginta el sango kaj brulo. — Kaj la gazeto ne malhavas memkonscion, cetere ĉerpitan ne senmotive ĝuste el la fakto de sia propra kreigo: ĝi deklaras, ke la provinco plu ne volas esti nur kolonio de „Budapeŝt-Hungarujo”, sed, el la vidpunkto de la demokratismo, oni devas akceli la „decentralizon” de la E-movado. Ĝi eĉ ellaboras planon pri naŭ landaj teritorioj kun propraj centroj por la E-movado. (Tia divido teritoria ankaŭ estas efektiviĝinta.)

Oni sciigas el la numero pri la refondiĝo de la Hungara E-Societo kaj de la Hungara E-Societo Laborista; tio montras, ke ankaŭ en Budapeŝto oni ne dormis. (Poste la du societoj unuiĝis en la Hungara Esperanto-Asocio.)

La unua numero okupiĝas ankaŭ pri komuninteresaj aferoj: atentigas, ekzemple, pri grandvaloraĵe arkeologiaj trovaĵoj: tombejo de homoj neolitikaj; priskribas inventaĵon svedan, la tn. „cikelbilstan sporton”, kiun oni ĝuas per aŭtomobilo movata per la piedoj (kiel ni scias de tiam, tiu pedalaŭto aŭ „tretomobilo” enmodiĝis maksimume kiel infanludilo). Ni trovas en la numero ankaŭ du poemojn, unu esperantlingvan kaj unu hungarlingvan; la lasta estas pli akceptebla.


La unuan numeron ornamas fronte la hungara blazono; en la maja numero ni revidas ĝin ŝanĝita: la krono sur ĝi mankas. Inter la du numeroj, nome, Hungario fariĝis respubliko. En ĉi tiu maja numero ni trovas jam longan artikolon de *L. Kökény* pri la postmilita situacio, kio montras, ke Budapeŝto ekatentis pri la provinca iniciato. Poste troviĝas informo pri tio, ke *Andreo Cseh* vivas kaj laboras en Nederlando (tiel estu longe!); alvoko, ke oni agitu por „leĝo pri Esperanto” inter la parlamentanoj, el kiuj ĉirkaŭ cent, do la kvarono, jam estas esperantemaj; avizo pri la baldaŭa apero de Universala Lernolibro de Esperanto verkita de *L. Kökény*; etimologia pritrakto pri la origino de kelkaj landnomoj. Pli altpretendaj estas rakonto en daŭrigejoj pri la vivo kaj bataloj de Semmelweis, kaj novelo de I. V. Kádár en la traduko de la karmemorulino *Sári John* (prononcu: Jon). Kaj ankaŭ eksterlandan kunlaboranton sukcesis akiri la gazeto, eĉ tiel renomana kiel *Vilho Setälä*: li ensendis la tradukon de „Substandarda Kanto”, poemo de I. Onerva.

Vivante tian vivovibron de la hungara esperantista movado, oni ne miras, ke post nelonge jam komencis aperi en Budapeŝto la tria periodo de la Literatura Mondo.

K.K.



Faŝistaj tankoj en fortikaĵo de Buda



La sorto de loĝantaro dum la sieĝo de Budapeŝto

Cevaloj dum la milito





Dum interrompo de sieĝo

1945-1975

Nia historio laŭ konfeso de malnovaj fotoj
Balado de la milito



Finiĝis la milito! Pano el la manoj de sovetaĵ soldatoj

K. KALOCSAY:

EN ĈI MURDEPOKO

*Subtile kanti en ĉi murd-epoko
pri l' propra vivo, kiam ja mililoj
per tomboj, tankoj, pafoj, pendigiloj
pereas, vere ŝajnus aĉa moko.
La tuta riĉa poezia stoko:
la luno, steloj, floroj, birdotriloj,
la delikataj amaj maltrankviloj
disflugas en la blov' de ĉi siroko.*

*La morto regas nun, la mort' avida,
amasa mort', vulgara kaj sordida,
sen cipresbranĉoj, sen solen' majesta.
Kaj kiel perdis dignon nun la morto,
la am' aspektas same io besta:
la ambrakumo ŝajnas seksperforto.*



Lingvo kaj logiko

Pri la *Lernolibro de Esperanto*, verkita de L. Mimó mi promesis daŭrigi mian recenzon koncerne la vortfaradon.

Siatempo, antaŭ 50 jaroj, mi komencis okupiĝi pri la E-a vortfarado sub la protestiga efiko, kiun al mi faris Karl Minor per sia sistemo konigita supleme en lia E-Germana Vortaro (1924). Laŭ tiu sistemo, nome, multaj ofte uzataj kaj ankaŭ Zamenhofaj formoj estus malpermesitaj. Mi pensis kaj ankoraŭ pensas, ke Zamenhof havis tre bonan lingvan instinkton, do tia sistemo, kiu kontraŭas lian uzadon, estas almenaŭ suspektinda. Post longa cerbumado mi malkovris la eraron de la Minora sistemo: ĝi baziĝis ja sur la ĝusta Saussure-a teorio (aprobata de Zamenhof mem kaj nun jam oficialigita de la Akademio), kaj ĝi estis logika en si mem, sed ĝia logiko estis statika, rigida. Zamenhof, male, aplikis sistemon dinamikan; ties logiko estis alia ol tiu de Minor. Ni vidu la diferencon inter ili.

Oni povas meti la regulon: „En ĉiu duelementa vortkunmeto la antaŭa membro devas esti substantivo, kiu ĉe l' analizo ligiĝas per speciala analiza prepozicio al la posta membro. Ekzemploj *dom-pordo* — pordo de domo; *sangavida* — avida je sango; *glavmurdi* — murdi per glavo. Ĉi tio estas la statika regulo.

La dinamika regulo tekstas: „Ĉiu antaŭa membro *fariĝas* substantiva per la *efiko* de la posta elemento”. Ekzemploj: *varm-energio*=energio de varmo; *prespreta*=preta je preso; *pafmurdi*=murdi per paf. (Malbonaj kunmetoj laŭ la statika regulo, ĉar *varm*, *pres*, *paf* ne estas radike substantivaj.) Krome, ĉe verbfinaj kunmetoj aldoniĝas ankoraŭ unu analizeblaĵo: la antaŭa membro povas esti la rezult-adjekto de la verbo: *ebenbati* (z)=bati (ion) ebena. Teorie ankaŭ ĉi tie temas pri analizo per prepozicio, ĉar en multaj lingvoj la rezult-adjekton enkondukas prepozicio. Ni imagu por ni klarige (ne enkonduke) tian prepozicion de Rezulto: ĝi estu ekzemple jeR, post kiu kutime staras subjektiv-funkcia adjektivo. Tiam la zamenhofa *ebenbati* estas bati (ion) ebena=bati jeR ebena, t.e. bati (tiel ke ĝi iĝas) ebena. Jen verbfinaj kunmetoj kun la

du analizoj: *pikmortigi*=mortigi per piko; *mortpiki*=piki morta=piki jeR morta; *batvundi*=vundi per bato, *vundbati*=bati vunda=bati jeR vunda; *laŭtlegi*=legi laŭta=jeR laŭta=(tiel ke ĝi iĝas) laŭta. Ĉi tiu analizeblaĵo estas grava, ĉar tiel analiziĝas ĉiuj kunmetoj kun „igi” kaj „iĝi”, ekz-e *saniĝi*=iĝi sana=jeR sana. Kaj tiel analiziĝas ankaŭ la regulaj prefiksaj kunmetoj: *kunveni*=veni kunaj=jeR kunaj=(tiel ke ili iĝas) kunaj; forigi=igi (ion) fora=jeR fora.

Mimó akceptas la dinamikan sistemon, kiam temas pri la efiko de la posta elemento al la antaŭa. Sed, mi ne scias kial, ĉu pro manko de fantazio aŭ de intelekta elasteco, li ne volas rekonii, ke okaze ankaŭ la antaŭa elemento povas efiki al la posta, do la efiko povas esti ankaŭ *invers-direkta*. Prepozicioj postulas post si substantivon, do povas post si fari substantivan vorton el adjektiva aŭ verba radikoj. Tiel praviĝas la Zamenhofaj *senforta*=sen-forto-a, *senprudenta*=sen-prudento-a, *pro-malĉasta*=pro-malĉasto-a, *senmova*=sen-movo-a, *senrevena*=sen-reveno-a ktp. ktp. Estas notinde — kaj ne logike — ke Mimó rekonas tian efikon ĉe verbaj radikoj, sed ĉe adjektivaj radikoj ties permesregulon li nomas „ĉiopraviga logiko” eltirita „el la maniko”. Nu, ĝi ne estas ĉiopraviga, sed Zamenhof-praviga logiko.

Ni reiru nun al la baza regulo de la vortkunmeto. Tie oni trovas, ke la analizo okazas per specialaj analizaj prepozicioj (de, je, per, jeR). Oni povas ja precizigi la sencon de la kunmetoj ankaŭ per aliaj prepozicioj, sed la analizo per la speciala prepozicio *devas* esti ebla. Ekz-e: *amletero* povas analiziĝi *letero pri amo*, sed ankaŭ la analizo *letero de amo* estas ebla. Same: *prespreta*=preta por preso=preta je preso; *pafmurdi*=murdi pafe=murdi per paf. Ĉi tiun regulon Mimó ignoras, kaj analizas per „kun”, ne rimarkante la mallogikecon, ke tio ebligas tiajn kunmetojn, kiujn la sistemo kaj li mem plej severe malpermesas. Ekz-e: „diligent-knabo”=knabo kun diligento; „severprofesoro”=profesoro kun severo.

Li ignoras ankaŭ la Fundamentan regulon, laŭ kiu „la finaĵoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vor-

toj”. Tial ekz-e la vorton *fruktodona* li analizas ne tre klare: *dona pri frukto* kaj simple rezignas pri la analizo de *hommortiga*, *flugiletenda*, *lumoporta* ks. Tamen, en ili „-a”, rigardata kiel memstara, substantivigas la tuton de la kunmeto per sia vortefiko kaj poste ligiĝas al ĝi kun sia signifo „karakterizata de”. Do ili estas: *karakterizata de fruktodono*, *hommortigo*, *flugiletendo*, *lumoporto*, *ĉioscio*. Tiel same li ne permesas verbigi per la verbfinaj substantivan kunmeton kiel tuton. Li malpermesas do la ofte uzatajn kaj zamenhofajn formojn: *partopreni*, *kortuŝi*, *genuflexi*, *voĉdoni*, *fiŝkapti*. En ĉi tiuj „-i”, rigardata kiel memstara vorto, havas la sencon „agi” aŭ „funkcii”. Ilia analizo do estas: „-i” per *partopreno*, *kortuŝo*, *genuflekso*, *voĉdono*, *fiŝkapti*.


La vortfara sistemo, eksplikita en P. G. kaj publikigita ankaŭ en la „Aktoj” de la Akademio, estas senlime elasta kaj plejeble konforma al la ĝenerala kaj zamenhofa lingvouzo, krome ĝi ŝajnas al mi prudenta kompromiso inter la tro analizaj (latinidaj) kaj tro sintezaj (ĝermanaj, hindaj) lingvoj. Estus malfeliĉo por la lingvo, se oni distaŭzus tiun sistemon.

Tamen, la vortfarado ne povas esti unuregula, senescepta. Tiaj esceptoj estas, ke kelkaj sufiksoj (kategoriaz sufiksoj, eta, ega, aĉa, -um ktp.) funkcias ekster la vortfaradaj leĝoj; ke pluraj prefiksoj estas analizeblaj ankaŭ adverbe: ekz-e *kuniri*=iri kune; ke kelkaj radikoj malregule prefiksiĝas en kelkaj kunmetoj: *junedzo*, *dikfingro*, *novplatonismo*, *rapidvagonaro* ktp. Plurajn tiajn derivaĵojn estas oportune anstataŭigi per novaj vortoj aŭ alia formo: *dikfingro*=polekso, *plenmano*=manpleno. Sed se kelkaj malmultaj restos, tio ne estas granda malfeliĉo, se nur oni rigardas ilin ne kiel *modelojn* sed kiel *esceptojn*.

Multajn aferojn mi devus ankoraŭ tuŝi, sed mi skribas recenzon, ne libreton. Konklude mi diras, ke la libro prezentas preskaŭ la tutan vortfaran sistemon konigitan en P. V. kaj tial la legantoj povas ĝin legi kun utilo sub unu kondiĉo: kie la aŭtoro de la libro esprimas sian malkonsenton pri unu aŭ alia parto de la sistemo, tie ili fidu la sistemon, ne la aŭtoron.

K. KALOCSAY

EGER



HEVES MEGYEI TANÁCSI ÉPÍTŐIPARI VÁLLALAT
KONSTRU-INDUSTRIA ENTREPENO DE KONSILANTARO
DE DEPARTEMENTO HEVES
3301 Eger, Klapka György u. II Pf. 7.

ÜGP | MALPEZA VANDO PANELO

LA KONSILIA KONSTRUINDUSTRIA ENTREPRENO DE DE-
PARTEMENTO HEVES (3301 Eger, Klapka Gy. utca 11. Pf 7.)
estas la plej granda konsilia konstruindustria entrepreno de Hun-
gario rigarde kaj la produktan amplekson kaj la etaton.

Krom tio, ke per ĝia kapacito ĝi kontentigas komisionojn por kon-
struado en Nordhungario, kaj en ties kadroj ĝi konstruas loĝdomojn,
kontordomojn, hotelojn, — ĝi posedas produktajn uzinojn por fab-
rikado de propraj produktaĵoj.

Unu el ĝiaj propraj produktaĵoj estas la planko ÜGP, kiu estas
interna vand-elemento 6 cm-ojn dika, etaĝon alta, el gips-perlita
materio. Per ĝia aplikado estas grandmezure akcelereblaj la finaj
laboroj de la konstruado, kompare al la procedo de murkonstruado
laŭ tradicia vandopretigado. Dum en la tradicia procedo de kon-
struado de la vandoj oni devas laŭnecese multan malsekaĵon uzi en
la interno de la konstruaĵo por fari la vando-surfakon estetike kon-
forma per pluraj laborprocedoj, — la muntado de la vando, farita
per ÜGP-muro. estas simpla, rapida, tre produktema, per ĝi la kon-
struadaj malsekaĵoj estas redukteblaj je minimumo, kaj certigas
per unu laborprocedo surfakon taŭgan por tapetado, aŭ farbado.

ÜGP estas patento de ÉPÍTÉSTUDOMÁNYI INTÉZET (Konstru-
scienca Instituto), la rajto de fabrikado kaj liverado apartenas al la
Entrepreno.



ÜGP | MALPEZA VANDO PANELO

Teknikaj indikoj de la vando ÜGP

Dikeco: 60 mm

Larĝeco: 600 mm

Longeco: 2500—300 mm

Pezo: 65 kp/peco

Materia premsolideco: 50 kp/cm²

Akustika izolado (kontraŭ sonoj tra aeraj) 28—30 dB

Fajrorezista limvaloro: 1 horo

Surfaco: spegulglata, post pretiĝo de la aliĝaj juntoj estas tuj farbebla, tapetebla.


Prilabor-ebleco: segebla, borebla, tajlebla laŭ longo kaj transverso.

Muntebleco: elektraj muntaĵoj.

La vando ÜGP estas pretigebla po kvadratmetro per 0,74 laborhoroj pli rapide, ol la tradicia morterumita, glatigita brikvando.

Agrikulturaj kaj naturdefendaj postulaĵoj devigis la entreprenon pretigi tian aparaton, per kiu la defalaĵoj, estiĝintaj en bestedukejoj de granda best-etato, estas porteblaj en fermita mekanismo sur la grundon.





La ĝis nun aplikita monopumpilo (*Beuer—Rota* kaj *NETSCH*) havas nur limigitan laborplenumon, tial tiuj ne estas oportunaj por transporti grandajn kvantojn, kaj tial la pumpiloj rapide foruziĝas. Sur multaj laborterenoj de la industrio por transporto de solidaj materialoj *MÉLYÉPTERV* (Subgrund-nivela Planentreveno) jam delonge uzas la tubkameran dozigilon. Per la dozigilo la skorio-flugcindro naskiĝanta en la varmenenergia-centraloj, la kalkoŝlimo, pecaj mineja neuzebloj kaj pecaj karbo, kaj aliaj grajnaj materialoj estas transporteblaj per hidraŭlika transportilo je 10—15 km-a distanco.


Tiun instalaĵon evoluigis *MÉLYÉPÍTÉSI TERVEZŐ VÁLLALAT* (Subgrundnivela Plan-Instituto) kaj la Konsilia Konstruindustria Entreveno de Departemento Heves en formo konstruebla kaj funkciigebla ankaŭ en agrikulturaj kooperativoj.


La irigacia sistemo planita kun la tubkamera dozigilo gajnis premion en la landa konkuro en 1973, kies temo estis: „Lokigo de la uzitaj akvoj de la specialigitaj best-edukejoj.”

La irigacia instalaĵo konsistas el du tubkameronj, 4 pecoj da aŭtomate funkciigataj finekipaĵoj kaj 4 pecoj da refrapiĝaj klapoj.

La Konsilia Konstruindustria Entreveno de departemento Heves disponas pri la instalaĵo kun monopolito por la utiligo — laŭ dokumento notita ĉe la Landa Inventaj-Oficejo. La planadon faros *MÉLYÉPTERV*. Tiu entreveno akceptas je mallonga limtempo la fabrikadon de la maŝinfakaj kaj elektraj instalaĵoj, ilian muntadon kaj provfunkciigon.

La Konsilia Konstruindustria Entreveno de departemento Heves jam instalas plurajn tubkamerajn kaj laŭ aliaj sistemoj funkciajn hidraŭlikajn aranĝaĵojn por agrikulturaj kooperativoj kaj por aliaj terenoj de la industrio. La irigacia sistemo konstruita kun tubkamera dozigilo iĝis universala, kaj plenumas tiajn taskojn, por kiuj la manopumpila sistemo jam ne estas uzebla.





Niaj instalajoj funkcias:

en *Szentegát* de 1973 kun povumo
 $100 \text{ Q/m}^3/\text{h}$,

en *Városföld* de 1964 kun povumo
 $100 \text{ Q/m}^3/\text{h}$,

kaj en *Rábafüzes* kaj *Szeged*



La malnovaj foiroj en la hungara ĉefurbo

Dufoje en ĉiu jaro okazas en Budapeŝto Internacia Foiro kun pli kaj pli grandnombra partopreno de eksterlandaj firmoj kaj entreprenoj: en majo la industria foiro kaj en septembro la agrokultura.

Ĉi-koncerne estas menciinde, ke jam antaŭ tre longe, antaŭ la fatala batalperdo ĉe Mohács en 1526 (kies sekvo estis la okupo de la lando fare de la turkoj), okazis foiroj en Buda, sur la loko nun nomata Sangokampo. Laŭ la notoj, tiujn vizitis komercistoj el Vieno, Nürnberg kaj Niĵnij Novgorod, ĉefe por brut-aĉetado. Por teni ordon, kaj precipe por defendi la partoprenantojn kontraŭ rabistoj, tiam gardostaris armitaj-kirasitaj membroj de diversaj gildoj. La turka okupado malebligis la daŭrigon de tiuj foiroj.

Kvindek jarojn post la liberiĝo el sub la turkoj jam ree estis famaj ĉie eksterlande la foiroj de Peŝto: oni tenis ilin kvar fojojn jare: en marto, junio, aŭgusto kaj novembro. Ilin vizitis komercistoj ekde Anglujo ĝis Turkujo, kaj, laŭ la tiutempaj statistikoj, partoprenis en ili po almenaŭ 20 mil foiruloj kun 14 mil veturiloj. La foiroj daŭris 14 tagojn. Granda zorgo estis, kiel tranoktigi tiun hom-amason, kaj ĝi estis ankaŭ lukriga por la loĝantaro: nokta loko sur pajlosako kostis po ormonero.

La unua agrokultura ekspozicio estis en 1857, en Peŝto; tie anglaj kaj germanaj firmoj jam ekspoziciis agrokulturajn maŝinojn. Al tiuj tutlande famaj foiroj baldaŭ formiĝis ankaŭ rivaloj: provincaj foiroj en Debrecen, Kecskemét, Hódmezővásárhely.

Pro la industriiĝo kaj moderniĝo, tiuj popolaj foiroj komencis perdi sian signifon iom post iom: la urbaj komercistoj kaj industriistoj povis ja proponi varojn pli valorajn ol tiuj elmetitaj en budoj aŭ tendoj. La lasta popola foiro okazis en 1929. Tiama ĵurnalo melankolie ĝin adiaŭas. La 29-an de aŭgusto, en dimanĉa tago, la komercistoj enpakis siajn varojn restintajn, kaj iliaj veturiloj, ŝarĝitaj de kestoj kuntenataj de ladbendoj, ekiris hejmen knarante. Per la senfine longa veturilvico, malnova komerca formo malaperis forruliĝante el nia ĉefurbo; ĝi perdis sian aktualecon kaj dronis inter la historiajn memorojn.

La nunaj foiroj, du fojojn jare, hejmas jam, kompreneble, ne en budoj kaj tendoj, sed larĝe kaj lukse en la parada pavilonoj de la Foirurbo de Budapeŝto.

Paŭlo BALKÁNYI

REVUO DE REVUOJ

PACO, bulteno de la MEM-sekcio de GDR, 1974, aperis ree en impona aspekto sur 40 paĝoj de brilglata papero kaj kun ilustraĵoj. Ĝi kompreneble estas neneŭtrala, aŭ, eble pli ĝuste, tre aktive neŭtrala gazeto. Vaste ĝi okupiĝas pri la puĉo de Ĉilio, represas la tiel emociajn lastajn vortojn de prezidento *Salvador Allende*, prezentas portreton pri la murdita Viktor Jarra, la konata ĉilia popola kantisto. Enestas ankaŭ portreto de la puĉestro generalo Pinochet en la rondo de liaj kunmurdistoj; tiun bildon tamen mi rigardis nur tre kure, ĉar mi timis, ke mi sonĝos pri ili. Tre interesa estas la artikolo pri la intrigaj planoj de Ĉinio, kies nunaj gvidantoj dezirus, ke la cetera mondo en atom-milito neniigu sin mem, por ke ilia lando estu la sola venkinto en la mondareno. Sed longe mi povus listigi la artikolojn interesajn, ekzemple pri E-o kiel pontolingvo, pri la historio de E-ismo en GDR, pri la sorto de virinoj en la vjetnama literaturo, pri fonemoj kaj sono (prof. Bokarev), la rubrikon de ampleksaj recenzoj ktp. ktp. Mi menciuj la grandformatan portreton de nia konata poeto *Aleksandro Logvin*, okaze de lia sesdeka naskiĝtago. Ni kore bondeziras al li ĉi tie.

KOMUNA ESPERANTO—GAZETO publikigas la artikolon „Naciismo kaj Esperantismo” de S. A. Li skribas en ĝi, ke Marx tro alte taksis la efikon de teknikaj fortoj al la menso de homoj, misjuĝis la tradiciojn, la inerton kaj konservativismon de la homa spirito. Estas iom tede, ke oni ĉiam ripetas ĉi tiun riproĉon al la marksismo. La marksismo diras efektive, ke finfine la evoluo de la teknikaj fortoj difinas la produkt-rilatojn inter la homoj, t.e. la socian sistemon. Tio tamen ne okazas aŭtomate, la homoj nome devas konsciiĝi pri tio, ke la ŝanĝiĝintaj produktfortoj postulas ŝanĝon de la socia sistemo. „La teorio, se ĝi penetras la konscion de la amasoj, fariĝas materia forto” — diras Marx. Tiu „teorio” estas la konsciiĝo pri la neceso de ŝanĝo. Ankaŭ la inerto kaj la konservativismo de la homa spirito estas „teorio”, sed negativa; oni devas ĝin elpeli per la pozitiva teorio. Kompreneble ĉio ĉi ne okazas kvazaŭ en kabineto, kie oni instruas kaj lernas la teorion teorie, sed forte kontribuas la konfuzoj de la eksmodaj produkto-rilatoj, kiuj instruas la teorion ankaŭ praktike per la akriĝo de la klasbatalo. — La aŭtoro mencias, ke ĉie oni vidas strebon por nacia sendependeco, ankaŭ en Vjetnamio la naciismo estis la forta motoro por tio, ke oni povis rezisti „la teruran teknikon de la krima, kruela Usona imperiismo”. Poste li skribas: „La ironio de la historio vidigas per paradokso, ke la popolo, kiu praktike kreis sian landon el la akvo, havas la plej malfortan nacismon el ĉiuj, kvankam ĝi la unua en Eŭropo havis la ŝancon fondi unuecan ŝtaton.” Mi miras pri tiu „kvankam” kaj skribus prefere „ĝuste ĉar”. Ĉu la aŭtoro opinias, ke la nederlandanoj estus same sennacismaj, se ilin superregus kaj ekspluatatus ankaŭ nun la hispanoj, aŭ la japanoj, aŭ la indonezoj? Dum la popoloj ne estos sendependeco, la batalo por sendependeco restos aktuala. — Samnumere (10, 1974) oni priparolas la interesan problemon, kiel reprodukti en E-o diversajn naciajn idiotismojn. Tio kompreneble tuj penis pri la „Domfabriko”, libro de frazeologiaĵoj nun presata en nia lando. Ĉar aperis tiaj kolektoj ankaŭ el la angla kaj germana lingvoj, oni vere povas paroli pri la aktualigo de la afero. La gazetartikolo enhavas kontraŭdiron; unue ĝi diras: „Estas eraro postuli aŭ

eĉ nur atendi, ke ĉiuj vortoj kaj esprimoj havu internacie kompreneblan ekvivalenton kun la sama sentovaloro kaj ŝarĝitan per la sama aromo kiel en la originala lingvo. Tio validas ne nur por la nederlanda, sed por ĉiuj lingvoj aliaj.” Oni do pensus, ke la aŭtoro forkonsilas la tutan aferon, sed poste li tamen streĉas siajn fortojn kaj provas pli-malpli sukcese reprodukti kvar el la idiotismoj. Sed se li trovis tion pri kvar, kiel rifuzi la provon pri ĉiuj? Certe okazos ankoraŭ multaj diskutoj pri ĉi tiu temo, sed espereble ili ne atingos la akrecon de „-ata-ita”, „io-ujo” aŭ de la Hamburgaj okazaĵoj.

THE WORKER ESPERANTIST, kiel mi jam skribis foje, interesas min precipe pro la Lingva Angulo de W. Prent, kies opiniojn mi kutime konsentas. Sed nun mi legis tie, ke anstataŭ „La libro estus devinta aperi pli frue” estus pli elegante skribi: „La libro estu aperi pli frue”. Oj, mi nun ne konsentas. Laŭ mi, oni ne povas postuli nun, ke io okazu antaŭ nun. Mi pensas, ke la indikativo de „devi” esprimu ĉiam ankaŭ la plenumon de devo: „Mi devis iri tien” signifas, ke mi devis kaj ankaŭ iris tien. La neplenumon de la devo, siavice, esprimu la us-modo de „devi”: „Mi estus devinta iri tien, sed mi ne havis tempon”. Tio neniam estigas konfuzon, ĉar estas ja vere, ke la us-modo de „devi” esprimas propre la fiktivecon de la devo mem, kaj ne ties neplenumon, sed tion esprimi oni bezonas nur kaj sole en frazo kun supoza subpropozicio: „Se mi devus tien iri, mi irus tien”. Aliflanke, en ĉi lasta okazo „devus” neniam estas komprenebla kiel neplenumo de la devo, nur kiel ties fiktiveco. La supran frazon do mi formus jene: „la libro devus aperi multe pli frue”. Ke temas pri preferito, tion certigas ĉi tie la adverbo „multe pli frue”.

INTERLINGVISTIKA INFORMA SERVO malesperigas min per la riĉo de sia materialo. El la numero (1, 1974) mi povas ellevi nur la raporton pri la libro de *Baziev* kaj *Isajev*: Jazik i nacija (Lingvo kaj nacio). La aŭtoroj solidariĝas kun la vidpunkto de akademiano *Berg* kaj de prof. *Armand* kaj *Bokarev*, konkludante, ke la vera kaj reala vojo estas uzi artefaritan lingvon kiel lingvon de scienco, kaj ili eĉ emfazas, ke por tiu celo Esperanto montris sin praktike taŭga dum 80 jaroj. Tio estas ĉiel ĝojiga turno kompare al la antaŭa negativa sinteno de soveta lingvistoj (Reformacikj, Hanarov ktp.).

El la BULGARA ESPERANTISTO mi ellevas la frapefekte kondensitan poemon de A. Robov: „Ĉilio”, kaj la dolĉ-amare emocian originalan noveleto de *Nevena Nedelčeva*. En ĉi lasta estas interese, ke je la demando „Vi ne havas patrinon?” la respondo estas „Jes. Ankaŭ patron mi ne havas.” La negativecon de la demando do la respondo konfirmas ne per „ne”, sed per „jes”. Tio estas la orienta parolkutimo, okcidente la konfirma vorto estus „ne”. Ĉar ĉi-koncerne la mondo kvazaŭ estas dividita en du duonojn, oni devus elpensi por E-o ian komunan manieron de konfirmo, por anticipi konfuzojn.

Por la laŭdo de la lerneja gazeto JUNA AMIKO mi povas diri pro la damna lokmanko nur tiom, ke mi envias ĝiajn legantojn, ne nur ĉar esti knabo estas pli bone ol esti aĝulo, sed ankaŭ tial, ĉar ili havas tian plezurigan legaĵon en sia librotornistro.



Keloj en Nagymaros — Grafikaĵo de Miklós Mazzaroff

Hungara aventurulo — Madagaskara reĝo

Oni pretigas komunan, slovakanhungaran televido-filmon pri la hungara aventurulo Maŭrico Benyovszky; la ĉefrolon ludas J. Adamoviĉ, el la slovaka Nacia Teatro Bratislava. Multe jam oni verkis pri tiu mistera homo: la hungara romanverkisto Mór Jókai du volumojn, Kotzebue dramon, iama pola ambasadoro en Budapeŝto libron eldonitan en Varsovio. Lia aŭtobiografio troviĝas en la Brita Muzeo.

Li naskiĝis el familio, kies membroj ekde la 14-a jarcento estas notitaj en la hungara historio kiel nobeloj-militistoj aŭ altaj ŝtatpostenuloj. Lia patrino estis Rozalia Révay. Naskiĝinte en 1741 en Verbo (nun en Slovakio), en sia 14-a jaro li eniris la Habsburg-imperiestran armeon kiel leŭtenanto kaj distingis sin en pluraj bataloj. Sed pro perforta bien-okupo li devis rifuĝi en Pollandon. Tie, en la servo de la patriota konfederacio, li batalis kontraŭ la rusoj, sed estis kaptita kaj ekzilita al Kamĉatko. De tie li sukcesis fuĝi helpate de Afanazia, la filino de la gubernatoro. Afanazia fuĝis kun li tra

Aleŭtaj insuloj, Japanio, Taivan, Makao, sed dumvoje mortis. Benyovszky atingis la insulon Ile de France; tie la franca gubernatoro lin konfidis fondi francan kolonion en Madagaskaro. Benyovszky komencis tion kun granda sukceso: tiom li simpatiigis sin al la popolo, ke la orientborda gento „betsimisarakana” lin elektis „ampansakbé”, t.e. reĝo, plej ĉefa estro kaj juĝisto. Li komencis prepari la unuigon de la tiea popolo. Li bone ellernis la malagasan lingvon, eĉ pretigis ties unuan alfabeton baze de latinaj literoj. Poste li vojaĝis al Franclando, volante rekonigi sian reĝecon fare de la francoj, sed, ne sukcesinte pri tio, li petis de Maria Tereza pardonon kaj hejmenvenis. Baldaŭ li partoprenis tiel brave en la milito kontraŭ la prusoj, ke li ricevis la titolon grafo. Sed lia maltrankvila animo ne lasis lin ripozi, li resopiris al la amata Madagaskaro. Li vojaĝis al Usono kaj tie sukcesis ricevi helpon por ekspedicio. Li bordis sur la insulo kun varbitoj, al kiuj amase aliĝis la indiĝenoj. Sed li estis venkita kaj mem falis en 1785.

Venkis la koloniismo, la ĉefa lingvo de la insulo fariĝis la franca, la malagasa estis nur nedeviga lern-objekto. Nur la sendependiĝo en 1960 alportis la reviviĝon de la malagasa lingvo kaj kulturo.

La malagasoj ne forgesis pri Benyovszky. En Tananarivo troviĝas strato Benyovszky; lia tombo ĉe la vilaĝo Fénéry, kie li mortis, surhavas sub lia nomo la skribon „Reĝo de Betsimisarakana”. Tamen, la hungara ĵurnalisto Péter Ruffy trovis, ke la malagasoj scias nenion certan pri la deveno de Benyovszky: multaj opiniis, ke li estis franco (lia nomo, cetere, sonas pole, eble slova-ke), kaj en la malagasa lingvo eĉ ne ekzistas vorto signifanta „hungaro”.

La hungara Solidara Komisiono, kies membro estis Péter Ruffy, vizitante la insulon, donis stipendion kun tiu celo, ke malagasa junulo povu studi en Budapeŝto. Kaj jam alvenis juna malagaso por esti studento de la ekonomia universitato en Budapeŝto.

Paŭlo BALKÁNYI

Vetero senkompata

Unue li enaŭtis en la garaĝon, sed poste retroveturis en la korton kaj per la ŝprucilo pedante lavis la veturilon. Eĉ en la malforta lumo, glime penetranta el la garaĝo, estis videble, ke ĝin kovras dika koto. Pluvis ekde mateniĝo. Ĉiu ŝoseo estas plena de flakoj, ŝlimo kaj insidaj kavetaĉoj.

Li reportis la aŭton en la garaĝon, fermis la pordon per ŝlosilo, poste iris al la pordo de la domo. Sur la sojlofero longe li purigis la piedojn, nur poste li prenis la ŝlosilon. La antaŭĉambro estis malvarma, ŝtonplanka, nehejtita. De aŭtuno ĝis printempo, kiam-ajn-foje li enpaŝas, ĉiam li pensas, ke fine estos necese enkonduki ankaŭ tien ĉi la hejtadon. Sed poste tio neniam realiĝas; en la varma ĉambro iel degelas la tiaspeca decidiĝo.

La edzino sidis en la angulo kaj trikis siajn eternajn trikotajn jaketojn. Ĉi-foje ian lilan. La televida aparato mallaŭte zumis, nur la bildoj pelis vigle unu la alian, eklumante alterne hele kaj malhele. La sonon Eta tute mallaŭtigis.

— Ĉu vi estas tre malsata?

— Kial?

— Tiun ĉi vicon mi ankoraŭ trikos. Sed se vi estas tre malsata, mi tuj alportos la vespermanĝon.

En la buŝo de la viro amasiĝis acida gusto, la malsato rongis lian stomakon, tamen li ne sentis veran apetiton.

— Lasu nur. Ne urĝas.

La virino alrigardis lin; lia voĉo iel frapis ŝin.

— Kio nova?

— Nenio.

— Sed jes, mi vidas!

La viro ĝemblovis.

— Mortlaca mi estas. Inferan tagon mi havis. — Li eksidis, ekfumis, sed pro la fumo la acideco en lia buŝo fariĝis ankoraŭ pli morda. Li faris tri enspirojn, poste forpremis la cigaredon. — Senrezulte mi veturaĉis tra la tuta tago!

— Ĉu vere?

— Jes! Eĉ al Vác mi aŭtis vane. Eĉ ne unu gramo da materialo!

— Spite, ke oni promesis. Kaj en Vörösvár, ĉu?

La viro rezigne mangestis. — Se en Vác oni ne havas, ankaŭ tie oni ne havas. Mi disipas nur la benzinon, kaj la negocajn drinkojn, abundege, je la ĉaspreto ankoraŭ kaptenda.

— Kaj ĉu Szekulics en Esztergom?

— Nu. Li ĵuris, ke postmorgaŭ ĉion mi havos ĉi tie.

— Li ne kutimas promesi senpripense!

— Ne, li ne estas tia. Ankaŭ mi fidis tion.

— Do morgaŭ vi ne foriros, ĉu ne?

— Sed jes. Denove al Vác kaj al Dorog.

— Tiukaze Francjo denove devos esti en la metiejo.

La viro kapjesis.

— Liaj malmultaj farendoj ne malhelpos lin en tio.

— Neprave! Vi ja scias, ke li lernas!

— Vane li lernas! — mangestis la viro. — Malgraŭ tio li ne povos eniri la universitaton, ne valoras la penadon.

— Li diris, ke nun li sukcesos.

— Ankaŭ pasintjare li diris la samon.

— Unu fojon fine tamen li devos sukcesi.

La virino finis la trikovicon, ekstaris kaj iris en la kuirejon. Ŝi ektimiĝis, kiam ŝi revenis kun la varmigita manĝaĵo; la viro nur staris, staradis en la angulo de la ĉambro kaj gapis al la tapiŝo. La televida aparato brue blekis, certe li laŭtigis la sonon per la turnilo, dum ŝi estis ekstere, sed la aktoroj ludis ankaŭ plu al neniu.

Ŝi rapide primetis la tablon, metis sur ĝin la manĝon, remallaŭtigis la sonon de la aparato kaj paŝis al la viro.

— Kio malbona, Francjo?

— Mi jam diris, nenio. Terure senfortigis min la tuttaga glitado. Kelkfoje la posta parto de la veturilo glitadis tiagrade, kvazaŭ ĝi havus skion sub si... El unu kavetaĉo en alian! Kaj nun vespere aldone ankaŭ la nebulo... Eĉ dio ne vidis ankoraŭ tiaĵon: pluvo kaj nebulo samtempe! Krome mian brakon dum la tuta tago ponardis la doloro kaj ne estas bagatelo teni per doloranta brako tiun abomenindan stirilon... Sur tia vojo! Kaj aldonu al ĉio ĉi, ke mia dekstraflanka reflektoro kaputiĝis post la ponto de Tahi!

La okuloj de la virino dislarĝiĝis.

— Ĉu per unu reflektoro vi venis?

— Per unu.

— Ĉu policisto ne vidis vin?

La viro ridis kun kontenteco.

— Ĉu en tiu ĉi kruela vetero?

La virino rigardis lin; ankaŭ nun ne plaĉis al ŝi la vortoj de la viro.

— Do tiam? Kio malbona?

— Mi ripetas: nenio. Mi enlitigis.

— Jen la vespermanĝo!

La viro ĵetis rigardon sur la tablon.

— Kio ĝi estas?

— Fritita porkotranĉaĵo kun krenosaŭco, kiel vi ĝin ŝatas.

— Nun tamen mi ne havas emon pri ĝi.

— Ĉu vi bonorde tagmanĝis?

— Ha! Nuran omleton en Vác, duone starante...
— Tiam vi devas manĝi! Tio ne estas daŭrigebla!
Ekde mateno vi pelas vin senmanĝe, soife! Kian finon tio havos?!

La viro eksidis, prenis viandon sur la teleron, detranĉis buŝplenon el ĝi kaj vole-nevole komencis ĝin maĉadi.

— Ĉu bongusta, Franĉjo kara?

— Jes. Sed fakte mi ne havas apetiton.

— Eble antaŭe guton da vino...

La viro grimacis.

— Eĉ la nura penso pri ĝi igas min vomi. La multaj negocaj drinkoj ĉie, malplen-stomake... „Do, la sekvontan semajnon kara kolego!” „Nu, je via sano!” „Kaj ne forgesu: almenaŭ du kvintalojn da ĝi...” Kiom mi abomenas tiun ĉi metion!

— Alimaniere ne prosperas la afero.

— Vere ne. Aŭ oni mendas, sed tiam mankas la materialo, aŭ abundas la materialo, sed ne venas la mendoj. Eĉ dio malbenis tiun ĉi metion.

La virino ekridetis.

— Ne troigu! Tio ne estas tute vera. Multe ni progresis dum dek jaroj!

La viro pravige mangestis. Silente li manĝis dum iom da tempo, poste ĉe la duono de la viando li demetis la tranĉilon.

— Nun donu gluton da vino!

— Ĉu ĝi sufiĉis, Franĉjo?

— Sufiĉis.

Nun jam ne gustis malbone la cigaredo, li avide forfumis ĝin. Dume li trinkis ankaŭ la glason da vino.

— Dio malbenu tiun ĉi fian nebulon... Kaj tiun aĉan kaputiĝintan reflektoron... Mi ĵuras, eĉ tion mi ne scias, kun kio mi koliziis.

La virino alĝapis lin.

— Kion vi faris?

La ŝultro de la viro ektiriĝis.

— Kun io mi koliziis, punkto. Kial vi estas tiom ektiminta?

— Ho dio mia! Kaj kio okazis?

— Kio okazus? Nenio!

— Ĉu la reflektoro estingiĝis tiam?

— Tute ne! Mi jam diris, ke post la ponto de Tahi. Verŝajne tio estis la kaŭzo: oni rigardis min motorciklo pro la unuopa reflektoro.

— Sed Franĉjo kara, diru, kun kio vi koliziis?

— Dio pli bone scias tion. Mi veturis kun apenaŭ kvardek- aŭ kvindek-kilometra rapideco pro la fia nebulo, bonŝance... Mi sentis nur ion molan, ian obtuzan etan knalon, ĉu vi scias, tian tute molan... La glacoviŝilo konstante funkciis, kaj la akvo torentis sur la antaŭa glaco, kvazaŭ riveretoj, plus la nebulo... Eĉ ĝis la nazo de la aŭto mi ne vidis, situacio malbenita! Kaj ĉio ĉi okazis tie, eble duonkilometron distance de tie, kie komenciĝas la novtipaj ferstangaj stratlampoj, ĉar la ordinaraĵ landvojaj lampoj, kompreneble, ankaŭ nun ne lumis... Jam la unua pluvero paneigas ilin!

— Ĉu vi eĉ ne vidis, kio ĝi estis?

— Kiel mi povus vidi ĝin? La dekstra reflektoro

ne lumigis, mi jam diris! Kaj tiu io staris tie, dekstramane...

— Tamen, kio ĝi estis?

— Ne diru stultaĵojn! Kiel mi sciu? Certe ia malbenita, vaganta virhundo, tiaj vagaĉas tiatempe, sen sia mastro... Aŭ la kapro de la maljuna sinjorino Fináli... — La viro frapis al si la frunton, ekridetis kaj faligis sin sur seĝon. — Nu, kompreneble! Ke ĝis nun tio ne venis en mian kapon! La nigra kapro de onĵo Fináli! Jen, kial mi ne vidis ĝin en la mallumo! Fulgonigra ĝi estas!

Vigle li ekstaris, paŝis al la tablo, verŝis glason da vino kaj per unu sola movo li eltrinkis ĝin.

La virino rigardis lin.

— Ĉu vi eĉ ne haltis, Franĉjo?

La viro demetis la glason, malrapide turnis sin. Lian vizaĝon iom post iom ruĝigis la sango, ĝis la frunto.

— Kial vi demandas stultaĵojn? Ĉu halti? En tiu ĉi aĉa vetero? Ja morgaŭ certe mi ekscios, kio okazis. Aŭ la maljunulino traveados la vilaĝon pro sia unusola kapro, aŭ la kadavristoj forportos la senvivan korpon de la amindumema virhundo, kiu renkontis la morton anstataŭ la belan silkecan hundinon...

Ankaŭ la virino trinkis el la vino, kvankam kontraŭ sia kutimo. Poste silente eksidis kaj ĝemspiris.

— Kaj se ĝi estis homo?

La viro rigardis sur ŝin.

— Kial ĝi estus homo?

— Ĝi povus esti, ĉu ne? Ja vi ne vidis ĝin.

— Mi ne vidis, kompreneble. Sed tio ankoraŭ ne motivas, ke ĝi estis homo! La hundon same mi ne vidis, la kapron same mi ne vidis! Ĉu ne?

— Sed jes.

— Do tiam?...

La virino kapjesadis, ne volis inciti la viron. Ja estas ekscitita la povra ankaŭ sen tio... Malofte li aspektas tia. Sed io tamen ne lasis ŝin trankvila.

— Kaj se tamen ĝi estis homo?

Per tia forto la viro ŝotis la seĝon starantan antaŭ li, ke ĝi pafiĝis en la angulon de la ĉambro.

— Ĉu mi sidu du jarojn en malliberejo? — li kriis, ke la vejnoj ŝvelis sur lia kolo. — Ĉu nun? Kiam mi havas tiom multe da klientoj? Aŭ ĉu oni reprenu mian aŭtistan rajtigilon? Ĉu nun? Kiam mi havas tiom multe da klientoj? Kiu faros la material-aĉetadon? Ĉu eble estos vi, kiu alportados la fermaterialon el Vác, el Esztergom kaj Dorog, piede, en viaj du malgrandaj manetoj? Kaj kiu prilaboros ĝin? Ĉu Béla? Ĉu Franĉjo? Aŭ ĉu eble vi?

Silente li reportis el la angulo la forŝotitan seĝon, eksidis sur ĝi. Li denove ekfumis: la fumo nun igis lin tusi, tamen li ne forpremis la cigaredon. Malfacile li spiris.

— Por tiu — li diris poste mallaŭte —, kiu ajn li estis, se entute estis iu, estas jam egale. Kaj ĉu mi punsidu du jarojn, bankrotu mia metiejo, vi kun Franĉjo malsat-mortaĉu, ĉar hodiaŭ pluvus ekde mateno? ĉar estas nebulo? ĉar la vojoj estas glitigaj, ĉar difektiĝis mia reflektoro kaj ĉar kaputiĝis la komunuma lumigado sur la landvojo? Pri kio el ĉio

ĉi mi estas respondeca? Ĉu estas mi, kiu faras la plu-
von? — Li ne delasis la okulojn de sur la virino. —
Ĉu estas mi, kiu blovas la nebulon en la vangaĉojn
de la homoj, he? Ĉu estas mi, kiu difektis mian
aĉan dekstraflankan ampolon? Aŭ ĉu la komunum-
man lumigon kaputigis mi preskaŭ de Tahi ĝis ĉi
tie? He? Tion ĉi respondu! Kial ĝuste mi suferu la
punon pro tia afero, kiu ne estas mia kulpo? Se tiel
stulta mi estus! Por tia naivulaĉo oni serĉu alian!

— La virino ne respondis; gapis la nenion. Post
iom da tempo ŝi tamen ekparolis.

— Ĝi estis la kapro Rozmareno de onjo Finali,
certe. Ĝi kutimas vagadi tiatempe apud la landvo-
jo... Ĉu vi memoras, antaŭ la pasinta jaro foje ĝi
preskaŭ renversis ankaŭ min. Jes, certe ĝi estis tio!
Estas ĝi, kiu kapablas aperi apud oni kun sia mal-
hela muzelo tiel neatendite, ke onin preskaŭ trafas
apopleksio. Alian fojon ĝi kornobatis Arankan, la
filinon de la familio Lacza; estas mirinde, ke ne
okazis pli granda difekto al la povrulino.

La viro kapjesis, malrapide, kun aplombo.

— Jen, nun vi parolis prudente. Estas kompreneble,
ke tiu bestaĉo estis tio! Estis ĝia malseka, pluvita
hararo, kiu tiome knalis!

La virino enpensigis.

— Do, ĉu ĝi knalis? — ŝi demandis poste. — Pli
frue vi diris, ke vi sentis ion molan...

— Jes! Ion molan, kio mole knalis! Ankaŭ pli frue
mi diris la samon!

La virino balancis la kapon.

— Diru do fine, ĉu ĝi 'tiome' knalis, aŭ 'mole'
knalis?

La viro salte stariĝis.

— Dio batu vin, kial vi kroĉiĝas al ĉiu mia vorto?
Mi estas nervoza, ĉu vi ne vidas tion? Jes ja, ĝi estis
mola kaj knalis mole! Kiel se kapro aŭ virhundo!
Kiom da fojoj mi ankoraŭ ripetu?

Nun el la malproksimo la vento alportis intensan
hundobojadon; tuj poste aŭdiĝis mallaŭta sono de
sireno.

Ili rigardis unu la alian. La viro seke glutis. Poste
la virino fermis la okulojn.

— Do, tamen ne kapro...

— Kial? — ekmurmuris la viro. — Pro kio pensi
tuj pri la plej malbona? Ĉu neniu povis rompi al si
la piedon en tiu ĉi malbenita vetero? Se li ne povas
paŝi, oni vokas la ambulancon...

— Mi ne scias — diris la virino. — Eble tamen
vi estus devinta halti...

Ili sidis, atentis. La sirenadon sekvis silento, kel-
kajn minutojn poste denove ekhurlis la stomako-
prema kriĉado. Kaj fine fariĝis tute silente.

— Ili foriris — diris iom poste la virino.

— Jes, for — diris la viro. Kaj glutis denove kelk-
foje.

La virino prenis la trikaĵon, sed ne komencis novan
vicon, nur sidis kaj rigardis la trikilojn.

— Jes — ŝi kapjesis postlonge.

La viro alrigardis ŝin.

— Kion vi jesas?

— Estus estinta pli bone halti.

La viro sentis, ke denove li devas ŝoti; sed nun

jam la tablon, la vitrinon, la televid-aparaton. Tamen
li ekregis sin.

— Ne frenezigu min, Eta — li diris mallaŭte. —
Ne frenezigu min!

Ekstere paŝoj ektondretis, plandoj frotiĝis al la
fera senkotigilo kaj al la piedviŝilo. Poste oni sonor-
igis.

La viro paŝis al la fenestro, gvate ĵetis rigardon
ekstere, poste kun stomako kuntiriganta alrigardis
la virinon. Li sentis, ke li devas vomii.

— Ke la diablo..., kian nazon ili havas! — li sib-
lis kaj ekiris al la antaŭĉambro. — Ili jam prifla-
ris min! Spite ke mi eĉ estus ĵurinta, ke neniu vi-
dis min!

— Kiu li estas? — algapis lin la virino.

— La policisto kaj Balajti el la konsilantaro.

— Ho sinjoro Dio!

Li abrupte haltis, alrigardis la virinon.

— Sed se vi, nur unusolan vorton... Tio ĉi jam
ne estas senriska ludo! Estas bonŝance, ke la aŭton
mi zorge lavis! — Kaj li ekiris por malfermi la
pordon.

Balajti enpaŝis la unua kaj etendis la manon por
manpremo. Nu, eble la afero ne estas tiel grava...
Aliokaze li ne komencus per manpremo. Eble ili ve-
nis nur por informiĝi: ĉu li ne vidis fremdan aŭton?

Ankaŭ la policisto klake kunfrapis la botojn kaj
demetis la ĉapelon.

— Bone, ke ni trovas vin sola, sinjoro majstro...
Ĉu via estimata edzino?

Li mane montris, ke ŝi estas interne.

— Ĉar estas afero ne por virinaj oreloj, kion ni
devas rakonti...

Nun kuntirigis lia stomako la duan fojon.

— Ankaŭ vi devas anime forti, sinjoro majstro.
En tia okazo ni bezonas nian tutan forton...

Denove li glutis kaj krampis sin al la malgranda
tablo.

— Vian karan filon trafis akcidento.

Liaj fingroj ekkrakis, tiom li premis la tablon.

— Kiam? — li anhelis. — Kie?

— Antaŭ du horoj, sur la ŝoseo. Apud la domo
Finali.

De kie oni ĉerpas la forton tiaokaze, por povi
malfermi la buŝon? De kie li ĉerpas?!

— Kaj... kaj kio okazis al li?

Balajti klinis la kapon; la policano suspiris.

— Unu horon li vivis ankoraŭ, la povra, tiel diris
la ambulanca kuracisto. Sed li forsangis... Male,
se pli frue oni trovas lin kaj li ricevas transfuzon
ĝustatempe, oni povus savi lin...

— Fia kanajlo! — la vizaĝo de Balajti deformiĝis.

— Estas kvarona horo ĝis la hospitalo de Esztergom!
Sed li plurapidegis!

La policisto rezigne mangestis.

— Tiaj estas ili ĉiuj! Kaj la kuracisto Bánkúti
veturis tiudirekte nur post unu kaj duona horoj...
Pli frue neniu rimarkis lin.

— Ĉu estas mirinde? — diris Balajti, disetendan-
te la brakojn. — La trafiko estas malgranda. Kiu
havas emon veturaĉi en tiu ĉi malbenita vetero?

Tr.: Tibor ÚJLAKY-NAGY

Multe da mono - ne ĉiam bono

De kiam la komerco evoluis tiagrade, ke ĝin ne kontentigis plu la primitivaj pagiloj (senpera var-interŝanĝo, feloj, bovino, peceto da oro detranĉita el orkoloneto ktp.) ĝi kreis por si pagilon ĝeneralan, la monon. Samtempe aperis ankaŭ la bankoj, kiuj plenumas diversajn financajn operaciojn. La praa formo de tiaj institucioj estis jam trovebla ĉe la antikvaj negocantaj popoloj, sed la bankoj — en sia hodiaŭa senco — formiĝis nur ĉirkaŭ la fino de la mezepoko. La estiĝon de la moderna nuna formo de bankagado oni povas kalkuli ekde la fino de 18-a jarcento, kiam firmiĝis la kapital-sistema ekonomio.

En nia lando — dum la Habsburga regado — en la monarkio Aŭstrio—Hungario funkciis nacia banko kumuna. En 1924 fondiĝis la sendependa Hungara Banko Nacia kiel akcia societo, sed ĝi servis la interesojn de la tiamaj regantaj, ekspluatantaj klasoj.

La historio de HNB abundas je eventoj. Post la dua mondmilito ĝi agadis inter tre malfacilaj cirkonstancoj. Jam antaŭe komenciĝis inflacio pro la militindus-triigo kaj armado (anoncita en 1938), kaj post la liberigo, sekve de damaĝoj militaj, kiuj konsumis 40⁰/₀-ojn de la nacia posedaĵo, ĝi furiozis en tia grado, kian ankoraŭ ne konis la mondhistorio. La pengō (tiam mon-unuo) horo post horo perdis el sia valoro kaj konsekvence la bankbiletoj surhavis neimageblajn ciferojn, kompreneble sen orkovra garantio. Ironie oni povas diri, ke tiutempe en Hungario ĉiu homo estis — inkluzive la suĉinfanojn — milionulo, eĉ miliardulo. Fine la foiraj vendistinoj jam tute ne sciis uzi la nomon de la bankbiletoj, kiuj reprezentis jam bilionojn, trilionojn, kvarilionojn, do ili parolis nur pri mono flava, ruĝa, blua, verda.

La komunista partio en 1946 iniciatis preparajn laborojn de la stabilizado. En tiu laboro HNB partoprenis ageme. La bridadon de la inflacio ebligis, ke ĉiam pli kaj pli da uzinoj komencis produkti, krome la ŝtato sukcesis reakiri la oran trezoron de la Hungara Nacia Banko, kiu dum la milito estis forportita el la lando. La 1-an de aŭgusto 1946 naskiĝis nova mono, kiu ricevis la baptonomon Forinto. Unu forinto egalvaloris:

400 000 000 000 000 000 000 000 000 000

malnovan monon (ne preseraro!), t.e. 400 mil kvadrilionon (= kvariliono). Tiajn nombrojn vere uzas nur astronomoj kaj atomfizikistoj. Ili signus ĝin pli simple: 4.10²⁰. Tiu ĉi ĉifero — 29 nuloj post la kvar — fariĝis kvazaŭ simbolo de la giganta inflacio.

En la vivo de HNB signifa dato estis 1974. Sekve de ĝia ŝtatigo ĝi fariĝis vere „nacia banko“, banko de l' popolo, kiu staras ankaŭ nun en la centro de nia bankorganizaĵo. Sed la agadtereno disvastiĝis. Krom la devizaj aferoj al ĝi apartenas — interalie — la moncir-kulaj kaj kredit-aferoj. La banko havas terribilon kun pli ol 2 mil eksterlandaj financaj institucioj, kaj pere de ĝi efektiviĝas ankaŭ la interpagoj kun aliaj landoj. La Hungara Nacia Banko — kiu nuntempe festis sian 50. naskiĝtagon — eldonas ankaŭ nun la hungarajn pagilojn, inter ili la plej grandvaloran papermonon 500-forintan, kaj la plej malgrandvaloran metalmonerojn du filerojn. Vere, ke la forintoj ankoraŭ ne abundas en ĉiu poŝo, sed la cirkulanta mono jam havas ŝtatan garantion, orkovron de laboro. Kaj la simplaj civitanoj tiun funkcion de la banko taksas plej grave, ĉar ili opinias:

Mono firma, bono ŝirma.

Ada CSISZAR

EDWIN DE KOCK

KADUKIĜO

En la florjuna mondo de la amo senĉese adoleska, la okulo juĝas, ke ili ĉiuj certe iĝas nevolaj sorĉistinoj — ĉi eksbelaj — del sombra korpdeviga tempdiablo. Kaj eble ĉiu pli ol sepdekjara ŝajnas kapabla (hop!) je nokta rajdo lante sur balail ĉe fumaj ombroj trans la vizaĝon del diska plenluniĝ.

Ho ne bruligu ĉi maljunulinojn en la rigard de via fajra moko, sed samsortane portu la printempon en vi, kun papili' kaj suntenero, jam ekster ĉiu velk aŭ vent, serene.

Unu jen pasis. Tra matenfenestro mi akre vidis la vizaĝruinon: ĉie tempfendoj malgraŭ ŝmink-refarboj, harblanko kiel herbo frostviktima kaj ostoframo knara pro artrito.

Sed io ĉe la lipoj, okullumo aŭ poz fiero forte diveniĝas pri la kaŝita mondo, kiun loĝas ĉi ankoraŭa junulino.

For,

kaj eble alikiam, florrivero pro konstantiĝ fluadas tra la tagoj sub suno fruoblikva, haltigita per bruska sorĉistina man-etendo apud montetoj frukte promesplenaj.

Pretere kuŝas maroj de allogo, korlandoj geamikaj — kiuj ne forfuĝas en la ombron — rid kaj rozoj kun ĉiu laŭelekta plaĉ aŭ paco prenanta korpon laŭ momenta vol.

Kaj ies maten-jun belkopra meze!

Ho suverena menso, ĝojkapablo, kiu el mia sango magi-geste povas ekzorci la korupt-diablon kaj forĝas kor-stabilan kontentejon, instruu al mi, ke ni homoj ĉiam konservas nian dignodaŭron nur per viv-aserto de la rev-real'!

Leterkesto

„De multaj jaroj mi estas fidela leganto de »Hungara Vivo« kaj ĉiam mi ĝojas, vidante ĝian ĉarmantan progresadon. Sed la plej gratulinda estas via lastatempa entrepreno eldonadi laŭtemajn numerojn. Kun vera ĝuo mi ensorbis la tri unuajn numerojn de la jaro. Ankaŭ aliaj personoj en nia urbo plezure legas la revuon. Ni abonigis al ĝi la respublikan bibliotekon.” *Boris Kolker* komitatano de TEJO. Ufa, Sovetunio.

„La du numeroj, kiujn vi eldonis en 1974 plaĉas al mi eĉ pli ol kuinte. Treege mi ŝatas la artikolojn pri la Esperantaj literaturo kaj poezio. Tre avide mi legis la artikolojn de William Auld, Vilmos Benczik kaj Kolomano Kalocsay kaj tre plaĉis al mi la ĉarma historio »Kolomboj« de József Lengyel.” *Robert Murray*, Southend-on-Sea, Anglujo

„Mi esperas al vi persiston daŭrigi vian belan celadon. Tute hazarde mi trovis ĉi tie ekzemplaron de via revuo kaj mi povas aldoni, ke tuj post mia reveno hejmen mi abonos ĝin pere de UEA. Ĝi meritas apogon, mi certas!” Sendita el Kastelo Gresillon de *Gerrit Berveling* Nederlando.

Al A. F. Koba el Krivoj Rog, Sovetunio, ni kore dankas la bondezirojn kaj specialan dankon ni ŝuldas al li pro lia salut-poemo. Ni klopodos ankaŭ en la futuro elmeriti lian subtenon.

Ni ne prisilentas, ke krom la gratuloj ni ricevis ankaŭ riproĉojn kaj kritikajn rimarkojn; precipe la reklamojn en nia revuo kelkaj trovas tro multaj. Sed alvenis ankaŭ aliaj, kontraŭaj opinioj, laŭ kiuj la reklamoj estas eĉ bonvenaj pro la vortmaterialo en ili trovebla. kaj ĝuste ili donas al la revuo aspekton similan al la nacilingvaj. Ni aldonas, ke la reklamoj donas enspezon, helpe de kiu ni povas aperi la revuon en eleganta formo, sur bona papero, kun multaj ilustraĵoj.

Ankaŭ ne ĉiuj niaj temoj plaĉas al ĉiuj niaj legantoj. Ĉi-koncerne ni klopodas kiom eble konformiĝi al la deziroj, sed servi ĉies gustojn estas tute maleble; pri tio ekzistas fama fabelo de Ezopo.

Stanislav Rimsky, Olomouc, Ĉeĥoslovakio. Vi demandis pri la signifo de kvar prepoziciaĵoj troveblaj en la Plena Gramatiko. Kalocsay respondas: *Detempe de...* estas zamenhoforigina, sed iom arkaika; nun oni diras de *post* aŭ *ekde*. *Fie* de estas preseraro anst. *fine de*; ekz-e: fine de la kunveno oni aplaŭdis. *Kontraŭvizaĝe de* (aŭ *al*) signifas *vizaĝo kontraŭ vizaĝo kun* aŭ *vidalvide kun*. Fine, *rezulte de* estu klarigita per ekzemplo: Rezulte de liaj esploroj, la problemoj estas solvita.

La redaktoro de HV atendas viajn leterojn kun kritiko konsultua, kun proponoj kaj instigoj.

Kompilis: L. RIETH

Senregula recenzo pri la dramo „Doktoro Rosales”

Tiuj, kiuj interesiĝas pri la nuntempa Esperanto-literaturo kaj pretas kunlabori al la modernigo de nia originala Esperanto-literaturo, ĝoje-time aprecas la aperon de dramo *Doktoro Rosales* — kaj gratulas al la verkinto, al la itala *Giorgio Silber*.

Doktoro Rosales estas en si mem la dramo de la mensa kaj senta izoligo, la interna dramo de Rosales. La problemaro el universala turniĝas en individuan, el etika en psikologian. La moralo de Rosales, kiu povus esti preskaŭ idilia himno, sub la ciro de falsa poluro montras

la ruston de la plej amara pesimismo: homoj, ĉiu homo posedas propran dramon, kaj ili ne povas komuniki ĝin al aliaj homoj: se oni sukcesas tion fari, la aliaj ne kapablos aŭskulti; se ili kapablos aŭskulti, ili tamen miskomprenos.

La dramo, kiel unua kontribuo de la aŭtoro al Esperanto-teatro ne devas, povas esti taksata, kiel mejloŝtono de nia literaturhistorio, sed ĝi sendube reprezentas rompon kun la tradicio, serĉadon de novaj vojoj, kaj plenumon de pli modernaj aspirioj.

E. I.

Korespondi deziras

Mi serĉas esperantistojn—ŝakistojn, kiuj volas ŝakludi perletere. *Alo Leis*, Karusmarja 2, Tallinn 12, Sovetunio.

*

Mi korespondus kun tiaj intelektuloj eksterlandaj, kiuj kolektas mini-librojn, kaj de kiuj mi povus ricevi tiajn miniaturojn interŝange por similaj hungaraj eldonaĵoj. Min interesas mini-libroj beletraj, sciencaj kaj belartaj. *Imre Szenes*, ĵurnalisto, H—1021 Budapeŝto II. Labanc u. 14/a, Hungario.

Humuro

Argumento. Teatraĵon de juna aŭtoro ege mallaŭdas gazeta kritiko. Li kolere eniras la redakcejon por ataki la kritikiston.

— Kiel vi kuraĝis diri opinion pri mia verko? — li diras. — Vi verkis ja nul teatraĵon ĝis nun.

— Nu, kaj kio do? Ankaŭ ovon mi neniam metis, tamen pri la omleto mi scias pli bone diri mian opinion ol la kokino.

Tenoro. La granda tenoro malsaniĝas, sed, feliĉe, troviĝas „ensaltanto” anstataŭ li. Kaj tuj lian unuan arion li devas ripeti pro tondra aplaŭdo. Ankaŭ duafoje li devas ĝin ripeti. Kiam la bisoj ankaŭ post ĉi tio ne ĉesas, li paŝas sur la randon de la rivalto kaj diras:

— Mi petas pardonon, sed kvarafoje mi jam ne kapablas ĝin kanti.

Tiam eksonas kria voĉo:

— Sed jes ja, fuŝulo, vi ĝin kantas, ĝis vi ellernos ĝin kanti!

Takto. Kvaro kartludas. La kongestemulo Flav deklaras ultimeton, sed lian atutan sepon oni forkaptas en la antaŭlasta preno. Li falas de la seĝo, mortinta. Apopleksio.

Granda zorgo, kiel sciigi la edzinon plej takte. Fine la taskon surprenas Verd.

Li iras al la domo, kie loĝis Flav, sonorigas, kaj diras al la virino malfermita la pordon:

— Mi vin petas, ĉu tie ĉi loĝas la vidvino de sinjoro Flav?


— Mi estas lia edzino, ne vidvino.

— Per kio ni vetu, sinjorino, ke vi estas vidvino?

Ekskuzo. La 16-jara Vera malfruis en la lernejo. Lia patro skribis ekskuzan paperon:

„Mi vin petas, sinjoro profesoro, pardonu la malfruon. Ni havas tri filinojn kaj nur unu spegulon.”

SUD-AFRIKO



La Sudafrika poeto Edwin de KOCK (1930—) jam estas konata al la tuta Esperantujo. Nia revuo Hungara Vivo ankaŭ prezentis lin en la numero 1969/3. Ni citas la du lastajn versojn de lia poemo „Sud-AFRIKO”, en la vicoj horizontala 1. kaj vertikalaj 28. kaj 27. Ensendi sufiĉas nur la citaĵon. Limdato de la ensendo: ĝis 1975—03—01 Inter solvintoj ni lotumos premiojn.

HORIZONTALAJ VICOJ: 13. Paserformaj birdoj kun flava, verda aŭ nigra koloroj. 14. Papago en Ameriko kun plumoj de vivaj koloroj (Radiko). 15. Al nedifinita loko. 16. Maŝina elemento, kiu portas la akson aŭ ŝafton de rado. 17. Apartenanta al granda publika ĉambrego. 20. KI. 21. Reen: malgrandegulo. 22. Ne povi, pro difekto de la okulaj muskoloj, direkti ambaŭ okulojn al sama celo (R). 23. Fianĉinoj el oro faritan havas (R). 25. Iridio. 26. Spireblan nesimplan gason, kiu ĉirkaŭas la teron. 27. Malagrabla sento ekz. pro vundo (R). 28. Malsano tre dolora de artikoj. 30. Ege facile aliformebla. 32. Malofta elemento, metalo, ĝia kemia simbolo estas Y (R). 33. Larĝa strato aŭ aleo, publika promenejo (R). 34. NOS. 35. ZU. 37. Samaj vokaloj. 38. Vegetaĵo uzata por la teksaĵoj, ĝia semo estas ekstraktelebla por ricevi oleon (R). 39. TO. 41. GI. 42. Apartenanto al iu grupo. 44. Efektive ekzistanta kaj kontrolebla (R). 46. Videbla aspekto de objekto (R). 48. Sube de la grandaj salaj akvoj, kiuj kovras la plej grandan parton de la terglobo. 50. Kapitalo destinita por aparta, difinita celo. 52. Vestaĵoj kiuj kovras la ŝultrojn. 53. Postsigno de subita rompiĝo kaŭzita de interna tro granda premforto. 55. Konjunkcio. 56. Aro de la vico 42. (R). 57. Malnova nomo de nitroĝeno. 58. Irigi antaŭ si al difinita loko. 60. RI. 61. La plej konata nuntempa hungara verkisto (László), H. V. 71/1. publikigis parton de lia Tolstoj-eseo kaj intervjuon kun la verkisto. 63. Ĝi kovras la ovon (R). 64. Samspecaj literoj de ĝemelo. 66. Survoja malhelpaĵo (R). 67. Pena agado por atingi, realigi ion.

VERTIKALAJ VICOJ: 1. Muzika peco kiun ludas unu sola artisto. 2. Sufiĉe malofta elemento, ĝiaj izotoj estas uzataj en atombombo. 3. Uzi la vidsenson al iu direkto. 4. Optika instrumento (R). 5. Ĉiu el la du flankaj partoj de la nazo. 6. Reen: numeralo. 7. Insekto, kies larvoj parazitas en la kapo de la ŝafoj sub la haŭto. 8. Antikvan mon- kaj mezur-unuon. 9. Reen: fari truon. 10. Malgrandegulo (R). 11. Persona pronomo. 12. Fakulo pri industria produktado (R). 18. Kolekto de samspecaj objektoj. 19. Agrabla kaj subtilaodoro (R). 22. Aro de samspecaj objektoj (R). 24. Instrumenton. 26. Kamparaj, rigardataj kiel rimedoj produkti nutraĵojn. 29. Finajo de verbo, pri kiu oni multe diskutis. 31. Identaj konsonantoj. 33. Malsupra ĉeftrabego de la ŝipoj (R). 36. Senescepte konkorde. 38. Ripetata praktiko (artikolo kaj radiko). 40. Maljuna (R). 43. ...to: maldika disketo el nefermentita panpasto. 45. Sufikso, esprimas parton de la tuto. 46. Granda hejmbesto, kies ino liveras lakton. 47. Kvaroble sep. 49. Preme malĝojiga, malhela (R). 50. Esperanta verkisto kies pseŭdonimo estis J. FORGE. 51. Malflueca, malfluida. 54. Soldata taĉmento (R). 57. Kore ŝatas iun. 58. Grekortodoksa pastro en la slavaj landoj. 59. Femaloj. 62. EBN. 63. Kalio, oksigeno kaj karbono. 65. Lingva Komitato. 68. LN. FERI

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Vilmos Benczik

Por variigi tiun ĉi rubrikon ĉiokaze ni ne pritraktos difinitan libron, sed ĉerpos nian materialon el la riĉa trezorejo de la Esperanta literaturo. Tamen, por faciligi la solvon de la enigmo, ni limigos nin je verkoj de hungaraj esperantistaj verkistoj, internacie konataj.

La tasko estas la jena: oni divenu la aŭtoron de la subaj citaĵoj, serĉu en iu manlibro (Gvidlibro por supera ekzameno, Enciklopedio de Esperanto ktp.) ilian naskiĝjaron, kaj adiciu la ciferojn, kaj alsendu nur ties sumon. (Ekz., se la tri naskiĝjaroj estas 1899, 1915, 1931, la alsendenda cifero estos 5.745.)

1. „Pro perdita ido
ploras turto-par'
kaj la vent' kun frido
ploron de amar'
portas, portas,
turne tordas
super la kovrilo
de lulilo
miezota
roskovrota ...
Dormu, filo, eta filo.”
 2. „La pensoj ĝermas, velkas,
Kaj dronas en la mut'.
Kaj pasas la senhalta Temp' ...
Ĉu horoj? Ĉu minut'?”
 3. „Lilioj, ho lilioj de l' ĝardeno,
ĉi arda blanko kaj ĉi frida spleno!
Parfum' ilia estas tiel peza
kiel la am': balzamo kaj veneno.”
- Limtempo de la alsendo de la solvo: 1975 05 31.
Solvaj de la enigmo en la numero 5/1974:
1. La Estona Legio estis organizita dum la germana okupacio en 1942, unue el volontuloj, poste el mobilizitoj. Ĝi formis parton de la germana armeo.
 2. Ruth.
 3. Kalle Paggi.
- Libropremion gajnis: Paul Hewitt, 1 Saltram Close, Nythe, Swindon, Wilts., SN3 3PH, Britio; Nataša Ipatova, 450076 UFA, Komunističeskaja, 17/7—8. USSR.

Niaj numeroj en 1975

- 2/75 — n.pri la liberiĝo de Hungario
3/75 — n.pri la problemoj de la gazetaro de Esperantujo
4/75 — n.pri Mór Jókai, granda hungara verkisto
5/75 — n.pri Lajos Tárkony, esperanta poeto kaj esekisto
6/75 — n.pri la esperanta libroeldono

LA PERANTOJ DE HUNGARA VIVO EN EKSTERLANDO

Peranto al eksterlando: KULTURA, H—1389 Budapest P.O.B. 149
Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 6,— Usonaj dolaroj, aŭ egalvalora sumo en alia valuto

AŬSTRIO: GLOBUS FINNLANDO: AKATEE- DÉLIBÁB FILM AND
(VAZ) Höchstädtplatz 3, MINEN KIRJAKAUPPA, RECORDS STUDIO, 19
1200 WIEN XX., Keskuskatu 2, 00100 Prince Arthur Street
west, MONTREAL 130
HELSINKI 10. P.Q.

AŬSTRALIO: C.B.D. LIBRARY AND SUBS. FRANCIO: AGENCE
SERVICE, Box 4886, G. LITTERAIRE ET ARTISTIQUE PARISIENNE, 23 Rue Royale, PARIS 8.
2000 COSMOS BOOKSHOP, SOCIÉTÉ BALATON, 12
145 Ackland Street, ST. KILDA 3182 READ AND Rue de la Grange Batelière, 75 PARIS IXe
CO., 694—696 George Street, SYDNEY N.S.W. 2000

BELGIO: AGENCE MES- SAGERIE DE LA PRESSE, 1 Rue de la Petit-Ile
1070 BRUXELLES OFFICE INTERNATIONAL DE LIBRAIRIE S. A., Avenue Marnix 30,
1050 BRUXELLES G.D.R.: ZEITUNGSVER-
TRIEBSAMT, Strasse der Pariser Kommune 3—4,
1004 BERLIN

BRAZILIO: LIVRARIA D. LANDY LTDA, Caixa Postal 7943, 0100 SAO PAULO

BRITIO: BRITA ESPERANTISTA ASOCIO, 140 Holland Park Ave., LONDON W11 4UF
COLLET'S HOLDINGS LTD., Denington Estate, WELLINGBOROUGH, Northants NN8 2QT
THE DANUBIA BOOK COMPANY, 58. Chatsworth Road, LONDON NW2 4DD

BULGARIO: DIREKZIA REP, SOFIA

ĈEĤOSLOVAKIO: MA- ĎARSKA KULTURA, Narodní Třída 22, 115 66 PRAHA I.
POSTOVA NOVINOVA SLUZBA — dovoz tisku, Vinohradská 46 PRAHA
POSTOVA NOVINOVA SLUZBA — dovoz tlace, Leningradská 14, BRATISLAVA

ĈINIO: CNPICOR, P.O.B. Nr. 88, PEKING

DANLANDO: MUNKS- GAARD'S BOGHANDEL, BOOKS P.O. Box 1017, SABA, Phong Phat Hanh
Norregade 6, 1165 KOBENHAVN K. RONTONTO Ont. M5T 2T8 NOI, RD

ITALIO: LIBRERIA COMMISSIONARIA SANSONI, Via Lamarmora 45, Casella Postale 552, 50121 FIRENZE
SO. CO. LIB. RI., Piazza Margana 33, 00186 ROMA

JAPANIO: MARUZEN CO. LTD., P. O. Box 5050 TOKYO INTERNATIONAL, 100—31. NAUKA LTD., 2—30—19 Minami-Ikebokoro, Toshima-ku, TOKYO 171.

JUGOSLAVIO: JUGO- SLOVENSKA KNJIGA, Terazije 27, BEOGRAD
PROSVETA EXPORT—IMPORT, P.O.B. 555, Terazije 16/1, 11001 BEOGRAD

KANADO: PANNONIA VJETNAMO: XUNHA- SABA, Phong Phat Hanh
Postal Station „B” TORONTO Ont. M5T 2T8 NOI, RD

KOREO: „CHUIL U”, PHENJAN

KUBO: INSTITUTO CUBANO DEL LIBRO, Obispo 461, HABANA

NEDERLANDO: UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, ROTTERDAM 3002

NORVEGIO: A/S NARVESENS LITTERATURTJENESTE, Box, 6140, OSLO 6.

POLLANDO: B.K.W.Z. RUCH, ul. WRONIA 23, 00—840 WARSZAWA

RUMANIO: D.E.P. BUCURESTI D.E.P. ARAD


SOVETUNIO: POCHTAMT—IMPORT, MOSKVA
POCHTAMT—IMPORT, LENINGRAD

SVEDIO: NORDISKA BOKHANDELN, Als-trömergatan 22, 101—10 STOCKHOLM

SVISLANDO: AZED AG. Dornacherstrasse 60—62, BASEL 4002
METROPOLITAN VERLAG, Teichweg 16, 4142 MÜNCHENSTEIN

USONO: FAM BOOK SERVICE, 69 Fifth Avenue NEW YORK, N. Y. 10003
HUNGARIAN BOOKS AND RECORDS, 11802 Buckeye Road, CLEVELAND, Ohio 44120

VENEZUELO: LUIS TARCSAY, CARACAS, Apartado 50892



Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
1368. Budapest, Hungario,
Kenyérmező u. 6.
Aperas dumonate
XV. jaro. 1975. 1-a numero

Cefredaktoro: Mihály Gergely

Responda redaktoro:

d-ro Jozefo Mátéffy

Lingva revizio: K. Kalocsay

Arta redaktoro: Jozefo Szekeres

Redaktorarao:

Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Császár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, Zsolt Gyarmathy, d-ro Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, László Rieth, Aurél Ponori Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Újlaki-Nagy

Cefkunlaborantoj:

D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Lajos Tárkony

La redakta komitato ĉiun merkredon kaj la unuan kaj trian jaŭdon de ĉiu monato posttagmeze de la dua ĝis la kvina horo havas akceptotagon.

Redakcio: Budapest, VIII.

Kenyérmező utca 6.

Telefono: 141-078

Eldonas: „Népszava” Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoŝefoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215—96162 Budapest. V. József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj)
Ft. 48.—, al eksterlando krome
Ft 9.60 por afranko.

Hungaroj ekabonu por eksterlandanoj!


75.4390 Dürer Nyomda
Gyula
Indexszám: 25.377



*Plurcela akvorezervujo — la lago de Pécs. Ĝia val-digo kolektas
kaj rezervas akvon por ferii, sporti kaj akvoprovizi*



Konsumturist



Valoraj artobjektoj
porcelano de bona marko
stilmebloj

Varojn aĉetitajn
en supraj vendejoj oni povas
sendogane elporti el la lando

Vi povas aĉeti el granda sortimento kontraŭ valuto
internacie ŝanĝebla

en niaj vendejoj en Budapeŝto
I. Hess András tér 3

Hotel Intercontinental-Hotel Gellért
VI. Népköztársaság utja 27.